

EL POPOLA ĜINIO

中國新道

10
1997

ISSN 0032 - 4361

BIBLIOTEKA UNIERSYTECKA

Esperanto

KUL

V-19034/1987

Projekto de la Tri Gorgoj

Kiel trakti krimadon
de adoleskantoj

Flosado sur Mengdong-rivero



Peonio

Foto de LIU SIGONG

INTER NI

La artikoloj aperis en EPCĈ 1997 estas pli mallongaj kaj la bildoj ĉarmaj, nur la kovriloj ne estas adekvataj. Dum mia vizito al Ĉinio mi vidis mirindajn fiŝojn, kiuj ne troviĝas en niaj maroj. Kial ne doni al ili eblecon ludi la rolon de unua aktoro kiel tiuj poŝtmarkoj, kiuj aperis sur dorskovriloj antaŭ multaj jaroj? Estas ankaŭ aliaj birdoj kaj bestoj, kiujn legantoj de EPCĈ ne konas.

BIANCA RAVIOLO (Italio)

Plaĉas al mi via nuna sinteno verki tekstojn unu-, maksimume dupaĝajn. Por rakonto la teksto povos, laŭ mi, esceptokaze kalkuli tri paĝojn.

GEORGO OTTO VASKE (Brazilo)

Mi tuj artikolon, ekz. "Akupunkturo kaj Kupra Homo", dissendis al aktivaj kluboj kun instigo, ke ili komencu same tradukadi el via gazeto aliajn artikolojn, ĉar tio estas konvena kaj ne perforta propagando de nia lingvo. Mi kredas, ke mia instigo havos eĥon kaj aperos pli ofte

artikoloj ĉerpitaj de la sama fonto. Mi ĝojas, ke ili presis artikolon preskaŭ komplete, nur iomete mallongigitan. Mi diligente tradukados aliajn artikolojn.

DRAHOMIR KOĈVARA

(Ĉeĥa Respubliko)

Ni tre ofte estas demandataj pri via lando, ĉar niaj amikoj scias ke ni ricevas vian revuon. La lastaj demandoj koncernas rekuniĝon de Hongkong kaj vian elektronikan kaj komputilan industrion, ekonomian vivon de malgranda kompanio ktp.

MONGĀZIB NARGIS kaj
ŜODIEV HASAN (Uzbekistano)

La ĉi-jaraj numeroj de EPCĈ ŝajnas al mi stratosfere pli bonaj ol la antaŭaj, ĝi estas multe pli varia kaj donas pli da atento al Esperantujo kaj eĉ al gejunuloj. Mi kredas, ke tiu estas la ĝusta vojo.

FRANCISCO L. VEUTHEY

(Redaktoro de "Kontakto")

El Popola Ĉinio

10 [469] 1997



Gaja festado
Foto de Yao Dawei

La 1-an de julio gejunuloj de diversaj nacioj en Pekino gaje festas la revenon de Hongkong al la patrujo, sur la placo Tian'anmen.

EL POPOLA ĈINIO


Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Hou Zhiping
Adreso: P.O.Kesto 77,
Beijing 100037, Ĉinio
Telefono kaj telefakso:
+86-10-6832 1808

ENHAVO

- | | | |
|----|--|---|
| 2 | INTER NI | Islamanoj en Xishuangbanna |
| 4 | EKONOMIE:
Projekto de la Tri Gorĝoj; Ĝi liberigis sin el embaraso! | 38 Rubo kaj bruo utiligeblaj |
| 7 | Informoj pri Hongkong (III) | 39 Virino en mamnutrado (Novelo) |
| 8 | ORIGINALE VERKITAĴ:
Kantoj el Usono | 42 EL ĈINAJ GAZETOJ |
| 9 | ĈINAJ E-ISTOJ:
Lokomotivisto Zhang Qingnian | 44 Amoplena "familio" |
| 14 | ESP-NOVAĴOJ | 46 Mem pagi por sia lernado en altlernejo |
| 15 | POR KOMENCANTOJ:
Por kio diligente lernas la edzino? | 48 TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:
Kiel trakti krimadon de adoleskantoj? |
| 16 | Andrea ne plu diras "Ti-ta" | 50 En la Ĉina Scienc-Teknika Muzeo |
| 17 | Historia momento por Ĉinio | 51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:
Tri Regnoj |
| 20 | Lang Ping revenis | SUR LA KOVRILO:
Gaja festado de la reveno de Hongkong al la patrujo |
| 21 | HOMARO KAJ NATURO:
Flosado sur Mengdong-rivero | 2 Peonio |
| 24 | Idilia loko de nacimalplimulto | SUR LA DORSKOVRILO:
[FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]
Flora ekspozicio en Nederlando; Kaskado |
| 28 | Bufedejoj en Pekino | |
| 29 | LAŬ LA SILKA VOJO:
Ĉarmaj paŝtejoj ĉe Tianshan-montaro | |
| 36 | MULTNACIA ĈINIO: | |



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|---------------------------------------|--------------------|
| 1. Tri Gorĝoj de Yangzi-rivero (p. 4) | 2. Handan (p. 6) |
| 3. Xishuangbanna (p. 36) | 4. Tianjin (p. 44) |
| 5. Guangxi (p. 24) | 6. Hukou (p. 42) |

Projekto de

de JI PING

EN novembro plenumiĝos grava parto la Projekto de la Tri Gorĝoj — haltigo de la fluo de Yangzi-rivero. Multaj atentis tiun gravan akvoutiligan konstruadon, komencitan en 1993.

ANTAŬ HALTIGO DE LA FLUO

En la 6-a kaj 7-a numeroj de EPĈ, 1992, legiĝas “Pri la akvoutiliga konstruado de Sanxia” (t.e. “Tri Gorĝoj”), en kiu oni konigas la rezonadojn, preparojn kaj la unuan periodon de la konstruado. En la 11-a numero de 1994 troviĝas “Pri la Projekto de la Tri Gorĝoj”. En tiuj artikoloj niaj legantoj trovis, ke la konstruado glate iras.

Mi volas unue paroli pri haltigo de la river-fluo, t.e. haltigi la fluon de Yangzi en la Tri Gorĝoj, konduki la fluon al la konstruita kanalo, kiun traveturos ankaŭ la ŝipoj. Oni konstruas du altajn digojn antaŭ kaj post la estonta baraĵo, kaj longan likimunan muron kun areo de 72 000 kvadrataj metroj, tiel aperos 630 000-kvadratmetra areo sur la rivero, oni pumpos la akvon el la loko kaj konstruos tie la baraĵon kaj elektrejon. La du digo el 12 mi-

lionaĵoj da kubmetroj da tero kaj ŝtono longos sume 2 000 m.

Oni konstruas sur la dekstra bordo la kanalon, kaj sur la maldekstra la provizoran kluzon kaj instalaĵojn por levi la ŝipojn. Post haltigo de la river-fluo, akvo fluos tra la kanalo kaj ŝipoj sekure traveturos.

Kiam mi preparis ĉi tiun raporton, la konstruado plejparte estis plenumita. Oni do atentis la haltigon de river-fluo.

ELEKTRA PRODUKTO, MEDIA PROTEKTO KAJ BATALO KONTRAŬ INUNDO

Yangzi-rivero, longa je ĉ. 6 300 km, ĉiujare portas 1 000 miliardojn da kubmetroj da akvo en maron. Estas 5 800 m la diferenco inter la plej alta akvosurfaco de la rivero kaj la plej malalta, kiu povas produkti 268 miliardojn da kWh da elektro, sed ĝis 1993, oni utiligis nur 6% de ĝi.

Post plenumo de la projekto, la Hidroelektrejo de la Tri Gorĝoj produktos ĉiujare 85 miliardojn da kWh da elektro. Kaj la jara transporta povo tra la Tri Gorĝoj pliiĝos de 10 milionoj da tunoj en la estanteco al 50 milionoj.

Oni zorgas ankaŭ pri la medio. Iuj timis, ke la projekto de-



Provizora kluzo maldekstre de Yangzi-rivero

la Tri Gorĝoj

truos la ekologian ekvilibron ĉe la Tri Gorĝoj. Post longa diskuto la fakuloj atingis la opinion: Ĝia produktota elektro egalos al la povo de 50 milionoj da tunoj da karbo. La de ĝi ellasita karbona dioksido malpliĝos je 120 milionoj da tunoj kaj reduktiĝos multe da malutila akvo kaj skorio kompare kun tiu de la sampa termoelektrejo. Fakuloj antaŭvidas, ke tiam somere la temperaturo malaltiĝos je 2 °C kaj vintre altiĝos je 2 °C, tio tre favoros la kreskadon de oranĝarboj, kaŝtandarboj, morusarboj kaj tearboj. La projekto ne malutilos al la vivo de ĉinaj huzoj, blanknaĝilaj delfenoj kaj aligatoroj.

Efektiviĝo de la projekto utilos ankaŭ al la batalo kontraŭ inundo. Ĝia totala akvokapacito estas 39.3 miliardoj da kubmetroj. Dank' al ĝi 13 milionoj da loĝantoj, 1.33 milionoj da hektaroj da kampoj en la meza kaj malsupra basenoj de Yangzi-rivero ne plu estos minacataj de inundo. Oni profitos ankaŭ de kulturo de akvoproduktaĵoj, akvo-liverado al urboj, irigaciado al kampoj ktp.

DAŬRE BELOS LA TRI GORĜOJ

Partoprenantoj de la 71-a UK en Pekino eble memoras la postkongresan ekskurson al la Tri Gorĝoj en 1986. Ĉu la konstrua-

do detruos la belajn pejzaĝojn?


Vere, 13% de la antikvaj konstruaĵoj kaj historiaj objektoj ĉe la Tri Gorĝoj estos superakvigataj post kiam la baraĵo ekfunkcios. Pro tio la koncerna departemento decidis transloki kelkajn el ili, ekz. valora historia objekto de Tang-dinastio (618-907) — granda ŝtono, sur kiu gravuriĝis desegnoj, ideogramoj kaj hidrologiaj notoj pri hidraŭlikaj materialoj en 72 akvomankaj jaroj. Nun oni planas ĝin eltranci kaj eksponos en la loka muzeo.

La naturaj vidindaĵoj ne multe ŝanĝiĝos post efektiviĝo de la projekto. La akvonivelo ĉe la baraĵo altiĝos je 110 metroj. Por multaj partoj de la Tri Gorĝoj, la akvosurfaco altiĝos ne multe. Se niaj legantoj refoje vizitos la Tri Gorĝojn, ili vidos pli ol 100 novajn vidindejojn, kiuj aperos post altiĝo de la akvosurfaco.

Majeste staros la 3 035 metrojn longa baraĵo, kiel "Granda Muro" sur la rivero; grupoj de dek mil-tonelaj ŝipoj glate iros tra ĝiaj kluzoj; gigantaj hidroelektrejoj produktos elektron kaj transmisios ĝin aliloken... Tiuj novaj vidindaĵoj certe pli multe interesos la turistojn. ■



Akvokonduka kanalo dekstre de Yangzi-rivero



Antaŭ altforno

Ĝi liberigis sin el embaraso!

de ZHANG WEN

LA Handan-a Ŝtala Grupo, kiu okupis la 11-an lokon inter la ŝtalaj entreprenoj de Ĉinio, rapide sin liberigis el embaraso per sia nova administra rimedo aplikata ekde 1991, t.e. kalkuli laŭ merkato kaj dekalkuli laŭ produktokosto, kaj donis ekzemplon al aliaj similaj ĉinaj ŝtataj entreprenoj.

Antaŭ pli ol 2 000 jaroj la urbo Handan, Hebei-provinco, famis pro fandado de fero. En 1958 starigis tie la Handan-a Ŝtala Grupo. En la 90-aj jaroj la nombro de ĝiaj funkciuloj kaj laboristoj superis 28 000, tamen ĝi malprofitis dum 17 jaroj post sia fondiĝo. Ĉar la ŝtato decidis ĝian produkton kaj respondecis pri ĝiaj profito kaj malprofito, la entreprenon portis sur si nenian premon. En 1989, kiam Ĉinio estis en reordigado de industria konstruado, la entreprenon estis puŝita en la merkaton, kaj la prezo de ŝtalproduktaĵoj falis fojerefoje kaj tiu de krudaj materialoj alte leviĝis. Pro tio la entreprenon vendis malprofite 26 el 28 specoj da siaj produktaĵoj kaj riskis bankroton.

Kiel la Handan-a Ŝtala Grupo sin liberigis el embaraso? Ĝiaj laborantoj diris, ke ili faris neniun alian ol agi laŭ la merkata leĝo. S-ro Liu Hanzhang, ĝenerala direktoro de la entreprenon, diris: "Tio, kion ni faras, estas koni la prezon de ĉiuj komercaĵoj en la merkato kaj poste kalkuli

ilian koston." Krome, la entreprenon salajras laboristojn laŭ iliaj meritoj.

Ĝiaj entreprenistoj resumis siajn spertojn per jena formulo: merkato — kosto — dekalkulo — indiko. Unue ili puŝis sian entreprenon en la merkaton kaj anstataŭigis la planizitan prezon per la merkata, poste ili kalkulis la produktokoston de ĉiu laborprocedo laŭ la prezo de la produktaĵoj rekonita en la merkato. Ili fiksis pli ol 100 000 normojn eĉ por papero kaj ŝtofpecetoj tre malmultekostaj. Trie, ili dekalkulis la premion kaj salajron de tiuj, kiuj ne plenumis sian taskon, kaj premiis tiujn, kiuj superplenumis sian laboron. Fine, oni fiksis la normojn por ĉiuj postenoj. Nun en multaj lokoj de la entreprenon videblas tabeloj, sur kiuj klare skribiĝas la nomoj de laboristoj, ilia postenoj kaj la taskoj por ili." Antaŭe ni konsumis 100 kg. da kalko por produkti unu tunon da ŝtalo, sed nun, 80 kg. Tiel ni ŝparas ĉiujare 12 milionojn da juanoj (1 USD = ĉ. 8.3 juanoj)," diris iu laboristo. Kion opinias laboristoj pri punado per dekalkulo de premio? Ili diris: "La entreprenon ŝarĝas vin per tasko, do vi estas mastro. Se vi ne plenumas vian laboron, vi do ne estas taŭga mastro. Tiam vi meritas la punon." La laboristoj jam havigis al si kutimon memkonscie kalkuli pri ĉiuj detaloj, ĉar la prospero kaj malprospero de la entreprenon

INFORMOJ PRI HONGKONG (III)

REGIONAJ FLAGO KAJ EMBLEMO

Sur la ĉefa parto de la regionaj flago kaj emblemo de la Speciala Administra Regiono Hongkong estas floro *bauhinia*, regiona floro de Hongkong. En la okuloj de Hongkong-anoj ĝi estas simbolo de unuiĝo, harmonio kaj nedisigebleco. Sur ruĝa fono de la regiona flago estas floro *bauhinia* kun kvinstelaj stamenoj meze de la petaloj. La ruĝa flago simbolas Ĉinion, dum la blanka floro *bauhinia* — Hongkong. Ili signifas, ke Hongkong estas nedisigebla parto de Ĉinio.

Ekde la 1-a de julio, kiam Ĉinio restarigis sian suverenecon super Hongkong, tie pendas ne nur la naciaj flago kaj emblemo de Ĉinio, sed ankaŭ la regionaj de Hongkong mem.

Oni komencis kolekti la projektojn pri la regionaj flago kaj emblemo de Hongkong en la 20a de majo, 1987. Ĝis la 31-a de marto, 1988, oni ricevis entute 7 147 projektojn. Post juĝado de 11 projektistoj-prijuĝistoj, oni elektis el ili 6 verkojn por fari refojan juĝadon. La juĝkomitatoj opinias, ke kvankam ĉiuj tiuj skizoj havas siajn proprajn trajtojn, tamen ili ne estas idealaj por la regionaj flago kaj emblemo. La desegnoj de la regionaj flago kaj emblemo nun uzataj estis faritaj de fama Hongkong-a arkitekto s-ro He Tao kaj du aliaj surbaze de la kolektitaj planoj. Per ŝanĝiĝo de la strekoj li emfazis la nesimetriecon de la petaloj de floro *bauhinia*, tiel ke la bildo impresas kiel

koncernas iliajn interesojn.

Sin savinte el la morto, la Handan-a Ŝtala Grupo bone funkcias, altigante sian ŝtalan produktokvanton de 1.1 milionoj da tunoj en 1990 al pli ol 2.3 milionoj da tunoj. Kaj ĝia profito okupas la 3-an lokon en la ŝtalaj entreprenoj de Ĉinio. S-ro Liu Hanzhang diris: "Ni fieras, ke nia entrepreno estas ŝtata." Do, multaj ĉinaj ŝtataj entreprenoj devas pensi, kial la Handan-a Ŝtala Grupo povas fari tion, sed ili ne.

Venonte, la Handan-a Ŝtala Grupo plenumos sian teknikan reformadon por atingi novan celon, t.e. levi la ŝtalan produktokvanton al 3 milionoj da tunoj en la jaro 2000. ■

moviĝanta.

POLICANOJ DE HONGKONG

La Ĝenerala Polico de Hongkong gvidas 32 800 policanojn, kiuj konsistigas 0.52% de la totala loĝantaro de Hongkong. Ĝia procento estas plej alta en la mondo. Kaj krome, en Hongkong estas 6 000 civilaj oficistoj, kiuj servas al la polico. En la urbaj kvartaloj de Hongkong, se nur oni telefonas je la numero 999, la deĵorantaj policanoj atingas la lokon post 3-4 minutoj por solvi la problemojn.

Ekde la 1-a de julio, la Hongkong-aj policanoj portas novajn kostumojn kaj polic-markon, sur kiu la bildo de floro *bauhinia* anstataŭis tiun de la reĝa krono. Krom tio la efektivaj funkcioj de la tieaj policanoj neniom ŝanĝiĝis.

RELIGIOJ

En la Fundamenta Leĝo de la Speciala Administra Regiono Hongkong oni notas, ke la loĝantoj de Hongkong havas liberecon de la religia kredo, publika predikado, okazigo kaj partopreno de la religiaj aktivadoj.

En Hongkong aktivadas pluraj religioj. Preskaŭ ĉiuj gravaj religioj de la mondo havas siajn adeptojn tie. Inter ili la taoismaj kaj budhismaj adeptoj estas plej grandnombraj. Ĉar budhismo kaj taoismo ne dediĉas grandan atenton al baptado, tial oni ne klare scias, kiom da taoistoj kaj budhistoj troviĝas en Hongkong. Laŭ takso ili estas ĉ. 650 000-700 000.

Sed estas iuj aliaj religioj, kiuj alte taksas la bapton, tial oni povas facile kalkuli la nombron de la adeptoj. Inter ili kristanismo estas la plej granda religio, oni taksas, ke la nombro de ĝiaj adeptoj superas 280 000. Katolikismo estas severa en la organizado, la nombro de ĝiaj adeptoj superas 250 000. En Hongkong vivas ĉ. 50 000 islamanoj. Krome, tie estas ankaŭ aliaj religioj, kiaj hinduismo, sikismo kaj judismo. ■

Religiuloj en Hongkong



KANTOJ EL USONO

de LAŬLUM

De decembro 1996 ĝis marto 1997 s-ro Laŭlum, eksa vicĉefredaktoro de EPĈ kaj membro de Akademio de Esperanto, vizitis Usonon. Dum la restado li verkis versojn pri tiu lando. Ni aperigas kelkajn el ili.

La Red.

Prociono

*Vi vidis iam procionon?
Se ne, vizitu jam Usonon.
Ĝi ege viglas noktohore,
en arbobranĉoj gajhumore.*

*Malfermas mi la pordon mian
kaj vidas koridore ian
besteton jen kun ringmakuloj
ĉirkaŭe de siaj okuloj.*

*Ĝi min rigardas kaj observas,
aplombon ĉiam ĝi konservas.
Ĝi ekas eĉ al mi sin movi ! ...
Ja kion povus ĝi ekprovi?!*

*Mi krias: tju! Kaj ĝi ektimas,
nur tiam la viziton finas.
Amikas ja pli prociono
ol hom' al homo en Usono.*

La aceroj

*Ĉe nia loĝejo ĉarmegas aceroj
kun ruĝaj folioj en formo de steloj.
La vintra malvarmo mildiĝas pro ili,
similaj al grandaj flamantaj kandeloj.*

*Mi scias, ke baldaŭ l' folioj defalos,
severa frostego decembra fatalos.
Sed venos printempo, la arboj reverdos.
Al bela idealo l' amikoj fidelos.*

Kolektanto

*Renkontis mi, en Hensel-Parko,
malgrasan viron altstaturan.
Li krozis ĉie kiel ŝarko
kaj serĉis ĉion eĉ malpuran.*

*Se li ekvidis paper-sakon,
bierbotelon, ladskatolon...
li tuj komencis sturmatakon,
ludante volontulan rolon.*

*Li levis ilin, tuj alportis
al rubokesto kaj enĵetis,
kaj tiel li la lokon ordis.
Neniu tion al li petis.*

Usono

*Samkiel ĉie, en Usono,
abundas bono kaj malbono.
La riĉaj ĝuas ĉian lukson,
kaj voje vagas hom' sen mono.*

*Kristanoj kantas pri la Dio,
justuloj pri revolucio,
magnatoj pri la profitejoj,
senlaboruloj pri nenio.*

*Usono estas vasta lando,
etendas sin ĝis ĉielrando.
Ĝi povus nutri pli da homoj,
ne nur la bovojn por viando.*



Zhang Qingnian prelegas en E-kunveno.

ZHANG Qingnian (Ĝang Ĉingnjan) kun meza staturo kaj bruna haŭto, kvankam pli-ol-50-jara, havas fortan korpon kaj entuziasmon por laboro kaj vivo kiel junuloj, tion ja montras lia nomo “Qingnian”, kiu signifas “junulon” en la ĉina lingvo.

Zhang naskiĝis en suda Jiangu-s-provinco. Infane li perdis la patron, kaj la patrino devis vivteni la 6-kapan familion. Pro la vivmalfacilo, fininte la lernadon en mezlernejo, li adiaŭis la hejmlokon kaj venis sola al la monturbo Sanming de Fujian-provinco. Li kaj studis kaj laboris pri mekaniko en kolegio. Poste li eklaboris kiel fervojisto.

Unue li estis hejtisto en vapora lokomotivo. Spite lacegon kaj malpurecon, li hardis sin antaŭ la varmega kaldronego. En libera tempo li multe legis librojn pri lingvo kaj literaturo, ĉar li tre ŝatis tion kaj esperis iam fari ion pri lingvo.

Zhang diligente laboris kaj en 1982 fariĝis lokomotivisto post ekzameno. Li eklaboris pri longdistanca veturigado en Yong'an, tre fora de lia hejmo. Tiam li kontaktis Esperanton. Li partoprenis korespondan kurson de Esperanto kaj poste studis en progresiga kurso.

Lia laboro estis tempo-raba, kaj krome, iro kaj reveno kostis du-horan trajnan veturon. Ofte li devis labori en noktomezo kaj ne havis regulan vivritmon. Tial li kaptis ĉiun peceton da tempo por studi Esperanton. En la pasintaj pli ol 10 jaroj li tiel studis kaj iom post iom progresis.

La laboro ankaŭ donis al li ŝancon kontakti

Lokomotivisto

Zhang Qingnian


Teksto de WANG HANPING
Fotoj de HAN HONG

pli multajn e-istojn. En Yong'an li ofte biciklis al kamparo por viziti samideanojn kaj organizis ilin en grupon. Li vizitis preskaŭ ĉiujn guberniajn grupojn en Sanming. Dank' al lia klopodo, fondiĝis junulara E-asocio de Sanming kaj E-asocioj de Sanming kaj Yong'an. Li funkcias nun kiel vic-prezidanto de la Fujian-a Esperanto-Asocio.


Liaj estroj de fervoja instanco alte taksas lian studadon kaj disvastigadon de Esperanto kaj donas al li favoron por aranĝi la laboron kaj E-aktivadon. Li opinias, ke la favoro venis de lia diligenta laboro. Li ĉiam bone plenumas la taskon donitan de la estroj kaj serioze obeas la regulojn. Multfoje li estis honorita kiel “avangarda laboristo”. Tiel li ricevis la komprenon kaj subtenon de la estroj.

Antaŭ kelkaj jaroj li eklaboris kiel administranto en Sanming-stacio, i.a. por mallongdistanca veturigado de dizela lokomotivo. Li havas regulan laborotempon kaj laboras proksime de la hejmo. Li do havas pli da tempo por Esperanto kaj funkciigas du E-kursojn, unu organizitan kune kun la televida universitato kaj la alian en hospitalo. Ĉiusemajne li instruas Esperanton kvar duontagojn.

Zhang Qingnian loĝas kun siaj patrino, edzino kaj gefiloj. La familianoj komprenas kaj subtenas lian E-aktivadon. Laŭ li, la plej valoraj por familio estas harmonio kaj feliĉo, kaj por homo — sano kaj scioj. Tion pruvas lia sperto: ĉiutage li laboras kaj studas pli ol 15 horojn, dank' al lia forta korpo. ■



1. Zhang Qingnian post deĵoro
2. Zhang Qingnian kaj liaj familianoj
3. Zhang Qingnian kaj lia edzino en legom-bazaro
4. Zhang Qingnian (la kvara de dekstre) kaj aliaj samideanoj en E-aktivado
5. Zhang Qingnian (la dua de maldekstre en la fronta vico) kaj alilandaj e-istoj





Ĉ	I	N	U	J
E				
Ĥ	A	L	D	E
U				
J	E	M	E	N

O				
---	--	--	--	--

L				S
---	--	--	--	---

Ŝ				
---	--	--	--	--

A				K
---	--	--	--	---

Ĝ				
---	--	--	--	--

C				
---	--	--	--	--

D				
---	--	--	--	--

N				
---	--	--	--	--

G				
B		I		

Omaĝo al verkisto Manuel de Seabra

PAVK (Profesia Asocio de Verkistoj de Katalunio) organizas omaĝon al verkisto Manuel de Seabra. La evento okazos en Barcelono, la 18-an de novembro de la kuranta jaro, en la salono de la Asocio de Ĵurnalistoj de Katalunio kaj partoprenos:

* Mag. Herbert Mayer, direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo, Vieno, kiu parolos pri la rolo de Esperanto en la Verkaro de Manuel de Seabra;

* Prof. D-ro Eduardo Mayone Dias de la universitato de Los Angeles, kiu prelegos pri Katalunio en la verkaro de Manuel de Seabra;

* Prof. D-ro Basilio Losada de la Barcelona Universitato, kiu disertos pri Manuel de Seabra kiel tradukisto;

* Prof. D-ro August Bover de la Barcelona Universitato, kiu parolos pri la kontribuo de Manuel de Seabra al la kataluna literaturo;

* Prof. Dimiter Anguelov de la Luzofona Universitato, Lisbono, kiu faros prelegon pri Portugalio en la verkaro de Manuel de Seabra.


Ĉiuj prelegoj aperos poste en speciala numero de Cuadernos de Estudio y Cultura (Kajeroj pri Studo kaj Kulturo), oficiala organo de PAVK.

La enigmo “Esperanto”

Jen vortludo elpensita de ĉina e-isto Wei Peijiang. 9 literoj el kvadratoj formas la vorton “Esperanto”. Kelkaj kvadratoj estas plenigitaj de 27 Esperantaj literoj (escepte de Ŭ). Ili estu la unua litero de vortoj kaj bonvolu plenigi la restajn kvadratojn, tiel aperos vortoj, kiaj nomoj de landoj, urboj kaj aliaj geografiaj nomoj. La litero “E” estas ekzemplo. Kompreneble estas ankaŭ aliaj solvoj. Bonvolu sendi vian solvon al s-ro Wang Hanping (adreso: El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio). La

pli bonaj solvintoj ricevos ĉinajn papertondaĵojn aŭ poŝtmarkojn kiel memoraĵon, ni ankaŭ aperigos elstarajn solvojn.

La Red.



ESP-NOVAĴOJ

ĈINIO

● La 6-8-an de junio 1997 la Unua Esperanta Kongreso de nordorienta Ĉinio okazis en Dandong, Liaoning-provinco. 67 esperantistoj el Liaoning, Jilin, Heilongjiang kaj aliaj ĉinaj provincoj partoprenis la kongreson. La kongreso aprobis deklaron, kiu respondas al la Praga Manifesto, por alvoki la polon uzi Esperanton en ĉiuj kampoj. La kongreso organizis ankaŭ someran tendumon. La kongresanoj veturis sur Yalu-rivero, piknikis kaj gaje amuz-



Dum somera tendumo

iĝis sur la river-centra insulo. (Wang Renhu kaj Ma Fengchen)

● La 8-an de junio 1997 okazis en Pekino la Simpozio de Ĵurnalisma-Fotografia Teorio de Jiang Qisheng, veterana ĉina esperantisto. Ĝian malfermon partoprenis 150 personoj el la ĵurnalisma rondo. En ĝi parolis Fan Jingyi, prezidanto de la Ĉina Ĵurnalisma-Fotografia Asocio kaj vicprezidanto de la societo de "Amikoj de Esperanto". Jiang Qisheng estas unu el la famaj ĉinaj ĵurnalistoj-fotografistoj. La foto pri Hujucz, pioniro de la ĉina Esperantomovado, kiu aperis sur la kovrilo de la 9-a numero de EPCĈ, 1996, estis farita de Jiang Qisheng. (Dai Song'en)

● Ĉinoj kutimas viziti tombejon en la 5-a de aprilo. En tiu tago de 1997 esperantistoj kaj geknaboj de Chengdu, Sichuan-provinco, vizitis tombejon de martiroj, inkluzive elstaran esperantiston Eltunko kaj lian lernanton. (Cai Shouzhi kaj Sabeo Fu)

BULGARIO

● Laŭ iniciato de esperantistoj-bahaanoj, la 8-an de aprilo 1997 en la Nacia Bahaa Domo, Sofia, fondiĝis Esperanto-societo "Lidia Zamenhof" ĉe la Bulgara Esperanto-Asocio. Al ĝi povas membriĝi ĉiuj esperantistoj el Sofia kaj nun estas 16. (Maria Taseva)

DANIO

● Antaŭ nelonge oni ekfunkciigis picejon en kopenhaga antaŭurbo Rfdovre, ĉe la strato Rfdovrevej

n-ro 322. Ĝia posedanto devenas el Izmir, Turkio, kaj estas heredanto de malnova turka gastronomia tradicio, pri kiu okupiĝis lia familio dum pluraj



Antaŭ la picejo

generacioj. Liaj kunlaborantoj estas liaj samfamilianoj. Surloke oni povas elekti unu el la 90 diversaj varmaj kaj malvarmaj manĝaĵoj. Ene la picejo estas ornamita per Esperanta flago, aliaj insignoj kaj keso kun informmaterialo rilate al lingvistudado por komencantoj. Oni povas ĝui Esperantan muzikon el tiea magnetofono. Por plibonigi siajn servojn al gastoj, la posedanto komencis lerni Esperanton krom nun paroleblaj lingvoj dana, turka kaj angla. (Eugeniusz Rybarczyk)

KROATIO

● Preparante la libron "La atestanto de tempo", kroatia esperantisto Vlado Jurkovic serĉas bonŝancajn gesamideanojn el la tuta mondo, kiuj pretas eltrovi iun murskribaĵon (grafiton) skribitan sur diversaj liberaj muroj, ĉirkaŭbarilojn kaj aliajn. La grafito povas esti laŭ la enhavo diversspeca. Bonvolu transskribi originalan tekston de la murskribaĵo kaj aparte priskribi la lokon, kie ĝi troviĝas (strato, placo, urbo kaj la lando). Ankaŭ vi povas foti la grafiton kaj sendi la foton aŭ pecon da filmo. Ne forgesu traduki la tekston en Esperanton kaj skribi vian nomon kaj adreson, por ke li povu mencii vin kiel kunlaboranton en la estonta libro. Adr.: B. Magovca 16a, Zagreb, Kroatio. (Vlado Jurkovic)

SLOVAKIO

● Sankt-Nikolaa Festo — Renkontiĝo okazos de la 5-a ĝis la 7-a de decembro 1997 en Pollando; Silvestra Balo — Vintraj Ekskursoj okazos de la 30-a de decembro 1997 ĝis la 2-a de januaro 1998 en Poprad; diversaj turismaj, kulturaj kaj fakaj aranĝoj okazos kiam ajn en Poprad aŭ alia loko laŭ mendo de enlandaj kaj eksterlandaj Esperanto-organizaĵoj. La restado povas esti mendebla ankaŭ individue. Informiĝu ĉe: Esperanto, Sobotske namestie 36, SK-058 01 Poprad, Slovakio. Fakso/tel.: ++42+92-324 19 (Esperanto)

Por kio diligente lernas la edzino?

ESTIS mezaĝaj geedzoj. La edzo estis supera oficisto kaj la edzino analfabeto. La edzo ege ĉagreniĝis pri la afero kaj la edzino tute ne.

“Mia kara, nun multaj penadas por esti kleraj, sed vi ne scias legi. Tio ege maltrankviligas min!”

“Kio? Mi lernu?! Mi eĉ ne scipovas uzi plumon, kiel do mi lernu? Lernu gejunuloj.”

Foje, la edzino lavis vestojn de la edzo kaj rimarkis leteron en lia poŝo bele skribitan sur papero bonodora. “Ĉu ĝi estas amletero?” pensis en si la edzino.


Antaŭ la letero ŝi plendis unuafoje pri sia senklereco. “Malgraŭ tio, mi devas tuj scii, pri kio tekstas la letero.” Tio, kion faris ŝia edzo lastatempe, pli kaj pli maltrankviligis ŝin: Nova ĉapelo, bonorda hararo kaj brilaj ŝuoj.

Nun tute ne eblis por ŝi legi la leteron, kaj plie, absolute ne decidis, ke ŝi petu iun alian legi ĝin. Kiam la edzo revenis hejmen, ŝi neniom menciis la leteron, sed anstataŭe kviete interparolis kun li. Subite, ŝi diris al la edzo, ke ŝi volas lerni. La edzo tre ĝojis: “Bonege! Mi instruos vin!”

Dum du monatoj ŝi lernis ĉiutage ĝis profunda nokto. Preskaŭ ĉiufoje ŝi ŝtele elpoŝigis la leteron por provlegi, sed ĉiufoje ŝin trafis malespero.

Kvar monatojn poste, la edzino scipovis iom legi kun helpo de vortaro.

Iutage, ŝia edzo estis for kaj ŝi komencis legi la leteron kun granda peno. En ĝi estas skribite: “Estimata s-ro Johano, laŭ via peto mi jam sendis al vi leteron. Mi pensas, ke probable post du-tri



monatoj via edzino sukcesos legi ĝin helpate de vortaro. Mi esperas, ke nia intenco donos frukton. Via koleginio Maria.”

Ŝi legis la leteron plurfoje kaj ne povis deteni sin de larmoj. Post momento ŝi ekridis pro la sincereco de la edzo. ■

Andrea ne plu diras "Ti-ta"

ANDREA estas tre ĉarma knabino. Kiam ŝi estis malgranda, ŝi kutimis diri "ti-ta" por signifi "horloĝo"-n. Horloĝoj ja faras "tik-tak" (almenaŭ en multaj eŭropaj landoj). Sed, kio estas do tiom stranga ĉe Andrea, ke aperis tute longa artikolo pri tiu "ti-ta" en la revuo de Universala Esperanto-Asocio?

Andrea efektive estas unu el la tre malmultaj infanoj, kiuj parolas Esperanton de la naskiĝo kun la patrino, jes kun la patrino kaj ne kun la patro. Ekzistas en la mondo multaj (eble 1 000, eble pli ol 1 000) familioj, en kiuj Esperanto estas ĉiutaga lingvo, sed la kutima situacio estas: la patro parolas Esperanton kun la infanoj kaj la patrino la lokan lingvon.

Andrea havas kuraĝan patrino, kiu aŭdacis rompi la kutiman skemon kaj paroli en Esperanto kun ŝi. Kaj kio okazis? Nu, nenio rimarkinda (almenaŭ supraĵe). Andrea lernis paroli en Esperanto kaj en la unuaj monatoj ŝia Esperanto enhavis tiajn bebajn formojn kiel "ti-ta". Andrea samtempe lernis paroli la lokan lingvon, kiu en ŝia kazo estas la hungara. Kaj nun kun surprizo oni rimarkis ke Andrea lernis ankaŭ la duan lokan lingvon, la serban. Fakte ŝi vivas en hungarlingva vilaĝo en la nuna Jugoslavujo.

Temas, kel vi povas konstati, pri tute normala viv-rakonto. Ĉie tra la mondo, kie infanoj vivas en medioj plurlingvaj, ili lernas la plurajn lingvojn sen grandaj problemoj aŭ eĉ tute sen problemoj. Efektive, se oni konsideras la tutan mondon, oni vidas ke lokoj, en kiuj samtempe estas uzataj pluraj lingvoj kaj dialektoj, estas pli multnombraj ol lokoj, kie estas uzata nur unu lingvo.

Tamen en la kazo de Esperanto oni devas havi kuraĝon por aldoni ĝin al la uzataj lingvoj. Unue la patro aŭ patrino ĝenerale opinias ke li aŭ ŝi ne parolas Esperanton tiom bone kiom necesas por paroli al infano. Tio ĝenerale ne estas vero, ĉar lingvon oni lernas per la uzo, kaj do se oni komencas paroli al malgranda bebo, oni malrapide mem akiras rimarkindan fluecon kaj la vort-trezoro nature pliample-


ksiĝas laŭ la bezono. Due la ĉirkaŭaj parencoj estas tre timigataj pro ĉi tiu nova strangaĵo. Ili timas ke la bebo ne lernos bone la lokan lingvon, ke ĝi konfuziĝos, ktp. Multaj klopodoj paroli Esperanton el beboj falas pro la obstina kontraŭstaro de neesperantistaj onkloj kaj avinoj, kiuj klare komprenigas al la esperantistaj gepatroj ke oni ne povas tiel turmenti la malgrandan idon. Trie infan-kuracistoj kaj instruistoj tre ofte malkonsilas samtempe instrui du lingvojn al infanoj, simple ĉar ili ne scias ke la modernaj malkovroj de lingvistoj indikas ke dulingveco estas favora por la mensa evoluo de infanoj.

Kompreneble en la kazo de Esperanto ankaŭ efikas la ĝenerala socia kontraŭstaro kontraŭ "strangaĵoj kaj utopiaĵoj".

Tamen... la afero progresas. Familioj uzantaj Esperanton plimultiĝas. Nun ili estas kunligataj de klubo en la kadro de UEA. Ĝi nomiĝas UEA-Rondo Famalia, kiu sendas al ĉiuj kunligan bultenon, instigas al vizito-interŝanĝo inter familioj kun samaĝaj infanoj, informas pri la tiel nomataj Renkontiĝoj de Esperantistaj Familioj (pri la lasta aperis artikolo en El Popola Ĉinio), provas instigi homojn aranĝi tiajn renkontiĝojn ankaŭ en mondopartoj, kie ili ankoraŭ ne okazas, ktp. Kiel la kazo de Andrea pravas, ankaŭ patrinoj komencas kuraĝe paroli en Esperanto kun siaj idoj. Tio estas tre signifa, ĉar la lingva influo de patrinoj en la unuaj jaroj estas multe pli granda ol tiu de la patroj.

Apartan dankon la esperantlingvaj familioj ŝuldas al la Ĉina Esperanto-Eldonejo, kiu tra la jaroj daŭre produktis eldonaĵojn por malgrandaj infanoj, kiuj troveblas praktike en ĉiu esperantista hejmo. Se vi legas ĉi tiun artikolon en la vespero, vi povas esti certa, ke ie en la mondo en tiu sama momento kelkaj gepatroj estas legantaj ĉinan fabelon al endormiĝantaj infanoj.

Se vi deziras aliĝi al la rondo, simple sendu poŝtkarton al UEA-Rondo Famalia (Nieuwe Binnenweg, 176 NL-3015 BJ Rotterdam Nederlando). La Rondo estas klubo de familioj sen kotizoj kaj sen membrokartoj. Ĉiuj estas bonvenaj. ■



Andrea kaj ŝiaj gepatroj.

HISTORIA MOMENTO POR ĈINIO

Fotoj de DA WEI kaj SUN SHUQING



JE nul horo de la 1-a de julio 1997, la kvin-stela ruĝa flago malrapide hisiĝis en la Hongkong-a Kunvena kaj Ekspona Centro, kio markis, ke la ĉina registaro restarigis sian suverenecon super Hongkong, kaj naskiĝis la Hongkong-a Speciala Administra Regiono.

Hongkong estas tuj apud la Suda Ĉina Maro. De post la Opia Milito en 1840, ĝi estis okupita de Britio pli ol 150 jarojn. Nun la ĉina nacio restarigis sian suverenecon super ĝi kaj tiel realiĝis la deziro de la ĉina popolo de kelkaj generacioj. Tiu historia momento estos gravurita en la historio por ĉiam. La 1-an de julio sur la vasta teritorio de la Ĉina Popola Respubliko ĉie estis ĝojo, kaj la tuta lando varme solenis tiun signifoplenan tagon.

Tiutage Pekino aspektis ekstreme bela. La tuta urbo estis iluminita, kun flirtantaj flagoj. Cent

miloj da loĝantoj kolektiĝis sur Tian'anmen-placo. Ili dancis kaj kantis por dividi la komunan ĝojon. Petardoj krakis en la nokto, brilis buntaj fajraĵoj sur la ĉielo. La urbo estis saturita de festa etoso.


En la Pekina Laborista Stadio okazis grandioza kunveno por celebri la revenon de Hongkong al la patrolando. Dek mil homoj el la Centra Filharmonio kaj aliaj 7 artaj taĉmentoj kaj junaj studentoj kune prezentis ĥoron "Himno al la Patrio". Miloj da homoj prezentis kalistenon. La impona ĥoro kaj

grandioza kalisteno puŝis la celebradon al la kulmino.

Samtempe ĉinaj elmigrintoj, ĉin-devenaj alilandanoj kaj alilandaj amikoj okazigis kunvenojn kaj gajajn renkontiĝojn por soleni tiun gravan historian momenton kaj esprimi sian bondeziron: "Pli belan morgaŭon al Hongkong!" ■


Artfajraĵoj — aldonita festa etoso






Pekino en gaja vespero


Hongkong-aj artistoj prezentas programerojn por celebri la revenon de Hongkong al la patrujo.



Por eterna memoro



Prezidanto Jiang Zemin manpremas kun princo Charles. Maldekstre de ili estas la ĉina ĉefministro Li Peng kaj dekstre — la brita ĉefministro Tony Blair.



La ceremonio, en kiu Britio redonis al Ĉinio la regpotencon super Hongkong

Lang Ping revenis



Lang Ping en trejnado

LANG Ping revenis de Usono kaj fariĝis ĉeftrejnistino de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo en 1995, kiam la teamo falis de la unua loko al la 8-a en la mondo.

Lang Ping estis unu el la ĉefaj ludistinoj de la Ĉina Virina Flugpilka Teamo en la 80-aj jaroj. Tiam ili gajnis sinsekvajn 5 mondĉampionecojn kaj Lang famiĝis kiel “Fera Martelo”, ĉar en la ĉina lingvo “martelo” estas homofono de ŝia familia nomo Lang. Poste, ŝi studis en Usono kaj samtempe laboris tie kiel trejnistino.

Kiam oni petis ŝin reveni al la patrolando kaj kontribui por la releviĝo de la teamo, ŝi diris, ke ŝi dankas la patrolandon pro ĝia fido kaj alta takso al ŝi kaj havas la devon fari ion por la patrolando, tamen ŝi timis, ke ŝi ne povos plenumi la taskon. Krome, estis kelkaj malfacilaĵoj, ekz. ankoraŭ

validis ŝia kontrakto kun iu usona teamo kaj ŝia studado ankoraŭ ne finiĝis. Ŝi hezitis.

Nun ŝi revenis al la teamo, en kiu ŝi kreskis de naiva knabino al mondfama sportistino. Ŝi devas klopodi por refortiĝo de la teamo. Ŝi bone scias, ke estas ege malfacile plenumi la taskon, ĉar en la mondo multas fortaj virinaj flugpilka teamoj. Ŝi volas unue havigi al la junaj ludistinoj penemon de la antaŭa teamo.

Ĉar ŝi mem estis ludistino, ŝi bone komprenas la nunajn ludistinojn. Dum trejnado ŝi malmulte parolis, silente rigardante la ludistinojn. Fakuloj diris, ke ŝia trejnado estas scienca kaj serioza. Unuflanke, ŝi afable traktas la ludistinojn kaj ili tre volonte obeas ŝin; aliflanke, se iu ne plenumas la taskon, ŝi donos seriozan punon. Foje, Liu ne finis kuradon, Lang ordonis: “Daŭrigu!” Liu spiregis. Iuj kuraĝigis ŝin kaj aliaj


kuris kune kun ŝi. Lang ridetis, ĉar flugpilko estas kolektiva ludo, la venko venas de la harmonia kunlaboro de ĉiuj ludistoj kaj trejnistoj. Jen ili havas tian kunlaboremon.

Kiel ĉeftrejnistino, ŝi ne havas sufiĉe da tempo por ripozi. Vespere ŝi devas okazigi kunvenon por resumi la tagan trejnadon, ellabori planon por venontaj tagoj, aŭ rigardi videobendojn pri la trejnado... Kvankam laca, ŝi ĝojas, ĉar la amikeco inter ŝi kaj la ludistinoj ofte donas al ŝi feliĉon. En la naskiĝtago de iu teamano, la petolemaj ludistinoj ŝmiris krimon de la torto sur ŝian vizaĝon, kaj ĉiuj ridegis.


En la pasintaj du jaroj Lang Ping pruvis, ke ŝi ne nur estis talenta ludistino, sed ankaŭ estas elstara trejnistino. En la Olimpiaj Ludoj en Atlanta en 1996, la Ĉina Virina Flugpilka Teamo okupis la 2-an lokon. En la Olimpiaj Ludoj Lang Ping dufoje svenis pro lacego. Je tio multaj scias, ke Lang Ping multe kontribuis al la sukceso kaj ankaŭ perdis multon en sia propra vivo — ŝi vivas fore de sia familio, de sia aminda filino, kaj ĉiujare enspezas malpli multe ol antaŭe je 100 000 usonaj dolaroj. Ŝi diris: “Mi revenis ne por mono, sed por la mondĉampioneco.” En majo 1997 ŝi reorganizis la teamon, celante sukceson de la ĉina teamo en la Olimpiaj Ludoj en la jaro 2000.

La 17-an de aprilo 1997, en Lausanne de Svislando, la Internacia Flugpilka Federacio donis al Lang Ping la titolon “la plej bona trejnistino de virina flugpilka teamo en 1996”. La honoron Lang Ping tute meritas. ■

Flosado sur Mengdong-rivero



Vendistino de rostitaj fiŝoj



Muelilo movata per akvo

Teksto de GUO SHI
Fotografioj de GUO SHI kaj SUN SHUQING


La rivero Mengdong estas en la nordokcidenta parto de Hunan-provinco. Ambaŭflanke de la rivero imponas belaj montoj kaj ĉarmas groteskaj rokoj, kaŝe fluas multaj riveroj en karstaj kavernoj. La pejzaĝoj estas tre admirindaj. La baseno de Mengdong-rivero estas ne nur kurioza pro sia tersurfaco, sed ankaŭ fama pro abundo da animaloj kaj vegetaloj. Tie vivas orharaj simioj, pteromoj (*Pteromys volans*) kaj aliaj, entute 200 specoj da raraj animaloj. Tie sur montoj, en valoj prosperas metasekvojoj, ginkoj, davidioj (*Davidia involucrata*) kaj aliaj, entute 500 specoj da raraj vegetaĵoj. Se vi veturas per kajako laŭ la fluo, vi sentas vin kvazaŭ vojaĝanta en natura galerio. Ambaŭflanke de la pli ol 100 km longa rivero estas movoplenaj urbetoj kun antikvaj moroj.

La pejzaĝoj ambaŭflanke de la rivero allogas per siaj beleco kaj imponeco, kaj estas interese ankaŭ viziti la kastelon konstruitan de tuĝa-oj antaŭ pli ol 200 jaroj kaj iliajn surfostajn domojn, kiuj elspiras la antikvecon de la nacimalplimultanoj. La flosado sur torenta rivero Mengdong estas forte inspira. Tie la malprofundaĵoj estas jen larĝaj jen mallarĝaj, jen

altaj jen malaltaj. Tamen la riĉa sperto de la boatistoj komplete sendanĝerigas vin. Rigardante la torentan akvon, vi aŭdas plaŭdadon. Tiam se vi levas la kapon kaj rigardas antaŭen, vi vidas, ke arĝenta akvofalo sin ĵetas malsupren de la krutaĵo pli ol 100 m alta en la riveron Mengdong kaj kreas larĝan akvan kurtenon ĉe la krutaĵo. Post kiam la floso trapasas la kurtenon, vi sentas, ke venkinte danĝerojn, vi fine eniras en kvietan kaj sekuran lokon.



Mallarĝa parto de Mengdong-rivero




Knaboj ludantaj en torenta akvo



Flosado sur Mengdong-rivero




Floso trapasanta akvan kurtenon



Akvofalo 200-metre alta

Idilia loko de nacimalplimulto

Teksto de PANG NAIYING
Fotoj de LIU SIGONG



RIGARDATE de sur aviadilo, la vasta tero de la Guangxi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono similas al mirinda penraĵo. Sur la ruĝa fono staras belaj karstaj montoj, fluas verdaj riveroj kaj inter ili punktiĝas vilaĝoj kaj sterniĝas kampoj kun ruĝaj, flavaj kaj verdaj vegetaĵoj.

ĈIE AŬDIĜAS KANTOJ

La ruĝa tero en la suda parto de Ĉinio estas loĝloko de ĝuang-oj, han-oj, mjaŭ-oj, jaŭ-oj, dong-oj kaj aliaj 7 nacimalplimulto. Malgraŭ la malsameco de naciaj moroj ili ĉiuj ŝatas kanti. En la 3a de la tria monato laŭ la ĉina luna kalendaro estas la Festo de Kantoj por ĝuang-oj. Tiutage oni elitiĝas ĉe la mateniĝo, tualetas, surhavas belajn vestojn kaj kun

ruĝaj ovoj kaj bunta glueca rizo iras al kunvenejo de kantado sur ebena loko en arbaro aŭ ĉe rivero. La kantado daŭras 3 tagojn kaj 3 noktojn. La gemaljunuloj kantas pri ĉiutaga vivo, dum la gejunuloj kantas am-kantojn. Ili ĉiuj improvizas la tekston, t.e. rimitajn versojn. En la versoj la floroj, birdoj kaj fiŝoj estas simboloj de amo.

Iu jaŭ-a junulo diris al mi, ke tie de longe estas moro gefianĉiĝi per kantoj: post laboro jaŭ-a knabo kantas popolkanton. Aŭdinte tion, knabino, kiu staras sur transa monto, eĥas lin. Se la kantoj plaĉas al ili ambaŭ, ili serĉas unu la alian laŭ la sono. La geamantoj povas distingi la voĉon de sia amato disde tiuj de aliaj eĉ en longa distanco. Antaŭe, kiam knabino atingis la aĝon de ekflorado, ŝiaj

gepatroj konstruis por ŝi surfostan dometon sub baŝoo (*Musa basjoo*). La dometo kun fenestro al la strato estis destinita por serĉi junan amaton. Tia domo nomiĝas gefianĉiga domo.

Ni vizitis jaŭ-an vilaĝon. Aro da jaŭ-aj knabinoj kun torĉo en la mano bonvenigis nin ĉe la vilaĝa enirejo. Informiĝinte, ke ni venis speciale por aŭskulti kantojn, ili kantis do por ni pri sarkado kaj priklado. Lokanoj diris al ni, ke ĉe sia edziniĝo knabinoj ploras por montri dankon al siaj gepatroj. Por bonvenigi gaston ĉiuj knabinoj de la vilaĝo eldomiĝas por reciproki kantojn kun la gastoj, kio daŭras la tutan nokton.

En la lastaj jaroj, la 3-an de la tria monato venis al la kunvenejo de kantado multaj el la lando kaj eĉ el la mondo, tiel ke tie aŭdiĝas

ne nur ĉinaj popolkantoj, sed ankaŭ alilandaj kantoj.

BELAJ RIVEROJ KAJ FONTOJ

Guangxi estas akvoriĉa loko. Tie la riveroj kaj lagoj inspiras multajn poetojn kaj montanojn en la laboro kaj vivo. Tie oni tre facile faras flosan el bambuo kaj kanuon el arbo-trunko. En la vilaĝo Huangdong en profunda monto jaŭ-voj veturas per senremila boato, ligita al kablo super la rivero, oni do veturas trans la riveron tenante la kablon per siaj du manoj. Super torenta rivero estas diversaj pontoj: dikaj lianoj pendantaj ĉe krutaĵo servas kiel balanc-ponto, antikva arbo rampanta super rivero kiel unutraĵa ponto kaj super iuj riveroj estas telfero...

Guangxi estas fontoriĉa. La temperaturo de iu fonto atingas eĉ 63 °C. Jam de antikve la lokanoj kutimas sin bani en termofonto. Tia bano estas tre efika por kuraci reŭmatismojn kaj dermozon. Oni rigardas tiajn fontojn kiel diajn fontojn kaj konstruis templojn por kulto ilin. Nun en iuj lokoj jam estas konstruitaj termofonto-sanatorioj, kun prosperaj verdaj arboj kaj diversaj surfostaj domoj destinitaj por noktado de sinbantoj.

En la Okcidenta Monto de Guiping estas la Lakta Fonto, kiu plurfoje ŝprucigis "lakton". El la fonto subite ŝprucas blankaj vezikoj kun bruado kaj la tuta fonto similas al bolanta lakto. Tiam se vi ĵetas centon da moneroj en akvoplenan tason, la akvo ŝveliĝas, tamen ne superfluas. La fontakvo estas riĉa je natura oksigeno, kiu povas forigi la malutilaĵojn en farado de vino kaj infuzo de teo. La Okcidenta Monto estas ideala loko por kreskado de tearboj, kaj la akvo el la Lakta Fonto estas tre bona por infuzi teon.

La ĉielskrapanta kamforarbo ĉe la Lakta Fonto estas tiel dika,

ke ĝin ne povas brakumi eĉ dekelkaj homoj. Ĝiaj maljunaj radikoj firme kaptantaj la rokmurojn krevigis ilin. Tie formiĝis natura murtapiŝo kun strangaj bildoj.

Ĉe la piedo de Ma'an-monto en Xing'an-gubernio estas la Kria Fonto. Ĉe ĉiu krio ŝprucas klara akvo. En Yangshuo-gubernio estas la Brua Fonto. Sur steleo legiĝas, ke la Brua Fonto havas du partojn. En ĉiu 60-a jaro ĝi multe ŝprucigas akvon kaj en ĉiu 30-a jaro ĝi malmulte ŝprucigas akvon. Antaŭ la akvoŝpruco la fonto tondras kaj poste akvo elŝprucas kaj inundas kelkajn hektarojn da kampoj. Ankaŭ en ordinaj tagoj ĝi bruas. Ju pli l' tago estas brila, des pli ĝia bruado laŭta.

LOKAJ BONGUSTAĴOJ

La tieaj manĝaĵoj estas distingigaj.

Jaŭ-voj metas rizon en bambuan tubon, bakas ĝin kaj manĝas la tiel bakitan rizon. Mjaŭ-voj volvas kokon en bambuajn foliojn kaj vaporumas ĝin. La tiel preparita koko estas bongusta. Ĝuang-voj volvas gluecan rizon en baŝo-ajn foliojn aŭ pistas akve mergitan artemizion kaj miksas


ĝin kun glueca rizo. La tiamaniere preparitaj manĝaĵoj odoras ian montan sovaĝecon.

La Guangxi-aj loĝantoj estas praktikaj. Ili alte taksas la originalajn formojn kaj gustojn de legomoj en kuirado. Ili faras verdajn pladojn el batato-folioj kaj melono-tigoj kaj kuiras la tuj lavitajn legomojn en kaldrono sen tranĉado.

Ili miksas diversajn spicojn kun dishakita viando kaj metas la spicitan viandon en kapsikon, momordikon aŭ litorinon kaj poste ilin vaporumas aŭ stufas. Oni tre admiras la tiamaniere faritajn pladojn el melopepo kaj mandarinino kun vianda farĉo ene.


Ja estas granda ĝuo trinki sojfaban lakton en restoracio de la urbo Wuzhou. Tie la kvietaj restoracioj plejparte situas ĉe monto. La sojfabo lakto preparita el muelitaj sojfaboj kaj fontakvo estas neĝblanka kaj bonodora. Estas bone, se oni manĝas samtempe kelke da delikataj kukoj.

En Guangxi la turistoj nepre devas manĝi taron. La taro, 2-3 kg. peza, produktita en Lipu-gubernio, iam estis tributo por imperiestra familio. Ĝi estas tre bongusta manĝaĵo. ■



Bongustaj manĝaĵoj de Guangxi

Prezentado de geedziĝa moro de jaŭ-oj




Antaŭ la prezentado



En termobanejo

La urbo Wuzhou
ĉirkaŭita de rivero





Akvofalo en densa arbaro

Bufedejoj en Pekino

ONI ne scias, kiam subite aperis multe da bufedejoj en Pekino, kontraŭ kiu oni plendis pri manko de nokta vivo. La bufedejoj kaj iliaj klientoj kune kreas novan vidindaĵon de la metropolo.

La unuaj bufedejoj de Pekino probable estis translokitaj el fremdlando. Oni multe investis por ĝia dekorado, kaj inter la administroj ne mankis tiuj el luksaj hoteloj. Iu bufedejo estas nomata “Malmola Ŝtono”, super ĝia fasado pendas modelo de aŭto kiel dekoraĵo. La bufedejo, originas el Britio. Ĝia rokmuziko estas en la unua loko, kaj ĝiaj alkoholaĵoj kaj eŭropaj manĝaĵoj en la dua. En la bufedejo la memoraĵoj pri rokmuziko tiklas la amantojn de tiu muziko. Post la bufedejo “Malmola Ŝtono”, oni malfermis “Vendredo”, “Kvin Popolanoj”, kaj “Ondo de Meksikio”, kiuj venis el diversaj landoj kaj ĝuigas diversajn vivstilojn. En “Pordo de Ĉaso de Kuriozaĵoj”, farejo de freŝa biero, investita de italo, oni povas trinki kelkdekajn bierojn; se vi havas intereson, vi povas mem fari tie bieron kaj ĝui ĝin.

Komence la konsumo nivelo estis kompare alta, popolanoj malofte vizitis la bufedejojn, kaj la oftaj klientoj estis oficistoj de ambasadorejoj kaj laborantoj de alilandaj kompanioj en Ĉinio. Sed baldaŭ pli kaj pli da ĉinoj estis allogitaj de la ekzoteco. Ili preferis multe pagi por ĝui la manĝaĵon,

trinkaĵon kaj kulturon de aliaj landoj.

Nelonge post la apero de fremdaj bufedejoj en Pekino, lokaj bufedejoj progresis kun rimarkinda rapideco. La unua aperis sur la strato Sanlitun, ĉar apud ĝi estis aŭtolavejo, oni nomis ĝin Aŭtolava Bufedejo. Poste ĉirkaŭ ĝi aperis dekelkaj bufedejoj. Ili estas kompare malmulte pagigaj, tial krom fremduloj, ili allogas ankaŭ pli multe da pekinaj junuloj. La klientoj eĉ rigardas viziton de bufedejo kiel modan ripozon. Ĉiuvespere post la 10-a estas horoj de kulmino. En semajnfino la bufedejoj plenplenas de klientoj.


Antaŭ la Aŭtolava Bufedejo estas rivereto. Vespere de somero, sidante apud la rivereto, oni komforte trinkas malvarman bieron en agrabla vento. Konforme al tia etoso, ĉiu bufedejo estas dekorita moderne. Iuj bufedejoj aspektas kiel forcejo. Sidante en ili, oni sentas sin kiel floro. Aliaj havas murojn plene kovritajn de abstraktaj olepentraĵoj. Triaj dediĉis spacon por prezenti ĵazon; iuj popularaj ĉinaj kantistoj prezentas tie, sed plej multe da kantoj estas fremdaj.

La bufedejoj, kiuj situas en aliaj lokoj, estas pli ĉinstilaj. “Popola Kanto” estas unu el ili. Ĝi estas ligna domo. Ĉiuvespere kantado en akompano de gitaro estas fiksa programo. Nemalmultaj klientoj venas por aŭskulti kantadon de la mastro. Iuj klientoj mem kantas, tiam la tuta bufedejo estas tre vigla.

En ĉiu bufedejo estas fremduloj. Multaj el ili preferas trinki ĉe bufedo. Ili sidas sur alta seĝo kaj babilas kun tiuj, kiuj estas en la alia flanko de la bufedo. Ili venas tien ne nur por ripozi kaj renkontiĝi kun amikoj, sed ankaŭ por forpeli la hejmosopiron. Iu usonano, kiu frekventas la bufedejon “Vendredo”, diris: “Ĝi havas saman etoson kiel en Usono. Mi sentas min kiel hejme.” ■




En pekina bufedejo



Ĉarmaj paŝtejoj ĉe Tianshan-montaro

Teksto de SUN AIJUN
Fotoj de LIU SIGONG



LA montaro Tianshan imponas meze de la Xinjiang (Ŝinĝjang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kiu areas 1.6 milionojn da kvadrataj km. Ĝi dividas la regionon en 2 partojn — la sudan kaj nordan. Ĉe la montaro ĉarmas vastaj paŝtejoj. Dank' al ili Xinjiang fariĝis loko kun brutobredado plej prospera en Ĉinio. Urumqi, ĉefurbo de Xinjiang, estis bona paŝtejo en la floranta periodo de la Silka Vojo en Tang-dinastio. Nun ujguroj kaj aliaj naci-malplimultoj tie vivas ankoraŭ ĉefe de brutobredado.

LA ĈIELA LAGO


100 km oriente de Urumqi staras la glacia monto Bogda, la plej alta en la orienta parto de Tianshan-montaro. La fama Ĉiela Lago sin kaŝas en valo inter


tiuj montoj.

Antikve, glaciriveroj kaj kotŝtonaj fluoj baris rivervojon sur alta monto kaj formis la nomitan lagon, kies akvo venas el Bogda.



La lago profundas meznombre je 40 m kaj areas 2.8 kvadratajn km. Legendo diras, ke la Ĉiela Lago estas kvieta sanktejo — Regno de la Diino Xiwangmu. Antaŭ 1 700

SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO





1. Tianshan-montaro
2. Paŝtejo ĉe Tianshan-montaro
3. Reveno de paŝtado
4. Ŝafaro ĉe sunsubiro
5. Delikat-lanaj ŝafoj



jaroj iu bela reĝo el regno en la centra Ĉinio vojaĝis tien kaj la Diino regalis lin ĉe la Ĉiela Lago per riĉa bankedo kun agrabla muziko. La reĝo donacis al ŝi delikatajn silkaĵojn kaj multajn aliajn produktaĵojn de sia regno. Kaj la Diino reciprokis lian afaŭblecon per neĝlotuso el Tianshan-montaro kaj lokaj valoraĵoj. Ŝi ankaŭ invitis lin viziti famajn vidindejojn de sia regno. De pli ol 1 000 jaroj oni rakontas pri la

Venis kazaĥa paŝtisto tiranta sian blankan ĉevalon kirasitan. Li demandis min, ĉu mi volas ricevi fotadon, rajdante sur lia ĉevalo. Li sin proponis akompani min por fari promenadon sur ĉevalo en profundo de montoj. Mi scias, ke tieaj pejzaĝoj estas eksterordinaraj kaj en aŭtuno tie floras neĝlotusoj, kiuj portas ankaŭ alian nomon "rozo sur alta monto". Ili simbolas firmecon, ĉar ili floras sur glacia kaj neĝkovrita

noj najbaras. Malproksime de maroj, Xinjiang kuŝas en la sino de Eŭrazio. Pro tio ĝi abundas je vento kaj neĝo en frosta vintro kaj al ĝi mankas pluvo en varma somero. Dank' al tiaj topografio kaj klimato, ĝiaj naturaj stepoj estas ne nur vastaj, sed ankaŭ multspecaj. Nun en Xinjiang estas stepoj de 57 milionoj da hektaroj, el kiuj 48 milionoj da hektaroj estas utiligataj, kaj ili konsistigas 20.4% de tiuj utiligataj en Ĉinio



Ĉe la Ĉiela Lago

Ĉiela Lago ĉiam lige kun la Diino Xiwangmu, eĉ priskribas la Ĉielan Lagon kiel ŝian arĝentan spegulon.

Lastasomere mi ĝuis apartan agrablecon ĉe la Ĉiela Lago, kun freŝa aero kaj milda vento. Malproksime de la lago staras la monto Bogda, kovrita de neĝo. Sur la lago sin movis kelkaj plezurboatoj. Laŭdire, la pejzaĝoj de la lago varias en la 4 sezonoj. La vojaĝantoj en Xinjiang, ĉu turistoj ĉu komercistoj, certe vizitos la lagon. Probable, ĝuste ĝia ĉarmo aliris komercistojn vojaĝantajn laŭ la Silka Vojo antaŭ 1 000 jaroj.

monto. Sed informiĝinte, ke por la promonado necesas 3-4 tagoj kaj sufiĉe da vestoj kontraŭ malvarmo, mi fordankis lian proponon. Ĉe la adiaŭo, mi aĉetis de li kelkajn sekajn neĝlotusojn.

SUR PAŜTEJO

Ĉirkaŭ la Ĉiela Lago etendiĝas verda paŝtejo. La tieaj kazaĥaj paŝtistoj ellernis lukri de turistoj, tamen kutimas ankoraŭ fari paŝtadon kiel siaj prapatroj. Sur la montdeklivo ĉe la lago ofte vidiĝas aroj da ĉevaloj kaj ŝafoj paŝtataj.

En Xinjiang montoj kaj base-

kaj okupas la 2-an lokon en la lando nur post la Interna Mongolio.


Historie, la brutobredado de Xinjiang dependis de la naturo. Paŝtistoj vivis nomadisme dum la tuta jaro. Al turistoj blankaj feltaj tendoj sub la lazura ĉielo ŝajnas pentraĵo kaj aroj da ŝafoj sur verda stepo similas al nuboj. Sed paŝtistoj ne havis fiksan loĝejon, nek fruktojn kaj legomojn, nek elektran lampon, por ne paroli pri televidilo. Nun ili faras ankoraŭ paŝtadon, tamen 82 000 el la 120 000 paŝtistaj familioj de la regiono havas loĝejon fiksan aŭ



Bredejo de laktobovinoj



En prilaborejo de laktaĵoj



Melkado



Trikistino

duonfiksas. Krome, kreskis la procentaĵo de vivaj brutoj reproduktitaj kaj multiĝis la nombro de venditaj brutoj. Dum sinsekvaj 19 jaroj ĝis 1996 la brutobredado prosperis kaj la enspezo de la paŝtistoj multe kreskis.

Brutobreda fakulo diris, ke en Xinjiang vivas landfamaj bonrasaj Ili-ĉevaloj, Xinjiang-aj brunaj bovoj, ĉinaj merinoj kaj Xinjiang-aj delikat-lanaj ŝafoj, precipe la lastaj, post pliboniĝo de sia raso en 1937, dum la 60 jaroj ĉiam okupis la unuan lokon en la lando ĉu per sia nombro ĉu per la kvalito de sia lano.

La Nanshan-a Ŝafo-reproduktejo, speciala por esplorado de ŝafoj, situas ĉe la norda piedo de Tianshan-montaro. Laborantoj de la ŝafo-reproduktejo rakontis al mi, ke dum la pasintaj pli ol 40 jaroj ili jam liveris pli ol 31 000 bonrasajn reproduktantajn ŝafojn al 14 ĉinaj provincoj kaj regionoj. Nun la ŝafo-reproduktejo dungis lokajn paŝtistojn por prizorgi siajn pli ol 8 000 ŝafojn. Akompanate de ĝiaj laborantoj, mi rigardis, kiel delikat-lanaj ŝafoj centope



sin banis en drog-akvo. En Xinjiang estas 7 tiaj ŝafo-reproduktejoj.

“FLORO EN TIANSHAN-MONTARO”

Menciante la evoluantan brutobredadon de Xinjiang, oni nature pensis pri ĝia tekstila industrio. Antaŭe Xinjiang havis neniu bonan tekstilan entreprenon. En 1952 tie konstruiĝis la unua moderna tekstila entrepreno kaj en la 90-aj jaroj tie estas kompleta tekstila industrio, ampleksanta pres-tinkturon, trikadon, konfekcion k.a, kun 120 000 laborantoj kiel unu el la 3 ĉefaj industrioj de la regiono.

Dank’ al sia seka klimato kaj longa sunbrilado, Xinjiang taŭgas por kulturado de kotonujoj kaj morusarboj kaj bredado de silk-raŭpoj. Xinjiang abundas je ŝafa lano, kies produktokvanto okupas la 2-an lokon en Ĉinio. Ĝia jara produktokvanto de ŝafa lano atingis 50 000 tunojn, el kiuj 80% estas bonkvalita delikata lano. Do, ĝia tekstila industrio ĝuas apartajn avantaĝojn.

Lanaĵoj kun marko Tianshan estas honorita kiel “Floro en Tianshan-montaro”. Ili estas vaste ŝatataj en Ĉinio kaj 60% de ili eksportiĝas al aliaj landoj.

En la norda antaŭurbo de Urumqi mi vizitis tiun fabrikan. La unua etaĝo de ĝia ĉefa domo servas kiel eksponejo de ĝiaj produktoj. Tie estas mondo de trikitaj vestoj el lano en stilo de Xinjiang aŭ en fremdlandaj stiloj. Ili allogas klientojn, pli grave, per siaj supleco kaj varmekonserveco.

En la unua etaĝo de la flanko domo estas lan-kombejo, kies maŝinoj plejparte estas importitaj el aliaj landoj. En la 4-5-aj etaĝoj estas trikejo, kudrejo kaj gladejo, kie energie laboras pli ol 300 junaj laboristinoj. La fabriko posedas 2 800 oficistojn kaj laboristojn, el kiuj 12% estas

nacimalplimultanoj.

Iu junulo, kiu iris kaj reiris inter la maŝinoj, altiris mian atenton. Li nomiĝas Ayupu kaj estas ujugura mekanikisto de la fabriko. Li estis sendita iam al Japanio por lerni maŝin-riparadon. Li diris al mi: “Mi lernis mekanikon en alt-

lernejo. Tamen mi devas senĉese lerni por ne esti postiginta, ĉar pli kaj pli modernigas ekipaĵoj de la fabriko.” Li estas posteulo de paŝtisto. Liaj prapatroj ne atendis, ke ilia posteulo laboras hodiaŭ kiel kvalifikita teknikisto en moderna tekstila entrepreno. ■

Muzika konkurso de Pola Radio

La Esperanto-Redakcio de Pola Radio lanĉas ĉi-jare specialan muzikan konkurson kaj incitas al kunlaboro la aliajn radiostaciojn (kiuj utiligas Esperanton), la E-gazetaron kaj muzikajn e-istajn organizaĵojn, kiel ekz. Muzika E-Ligo, Eurokka.

La celo de la konkurso estas atentigi la esperantistaron pri la ligoj de E-o kun muziko, popularigi la ĝisnunuan utiligadon de la internacia lingvo por muzikaj celoj (kantoj, leĝeraj kanzonoj, serioza muziko ktp.), sed ankaŭ vastigi la aplikadon de muzikaĵoj en la formo de kantoj por didaktikaj celoj kaj utiligadon de E-o kiel inspirfonto por komponistoj.

Por partopreni la konkurson sufiĉas respondi al unu el la jenaj tri demandoj:

1. *Kiu el la originalaj poemoj de la kreinto de E-o, Ludoviko Zamenhof, fariĝis kanto-teksto?*

2. *Menciu almenaŭ unu el la konataj al vi kantistoj (kanto-grupoj, orkestroj), kiuj plenumis aŭ plenumas kantojn en E-o.*

3. *Kiu konata al vi komponisto havas ĉi-jare sian rondciferan datrevenon de la naskiĝo (morto)? Kiun — ekzemplodone — komponaĵon de tiu komponisto vi konas?*

Dezirante faciligi la respondojn kaj samtempe plivastigi la primuzikan informadon Pola Radio prezentos en siaj E-elsendoj de la mezo de aprilo ĝis la 30-a de novembro 1997 amason da informoj, intervjuoj ktp. pri E-o kaj muziko.

La respondojn oni sendu al la adreso: **Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-977 Varsovio, Poŝtfako 46, Pollando**, aŭ per la reto: **pettyn@radio.com.pl** (per fakso: **48-22-645-5917**).

La anonco de la konkurso-rezultoj kaj prezento de la nomoj de premiitoj sekvos la 15-an de decembro 1997 — en la tago de la Zamenhof-festo — en ĉiuj E-elsendoj de Pola Radio.

En la konkurso oni lotumos kiel premiojn kasedojn kaj kompaktnajn diskojn kun E-kantoj, E-librojn (i.a. kantarojn, muzikajn albumojn), muziknotojn kun kanto-tekstoj en E-o ktp.



Islamanoj en Xishuan

de RONG ZU

EN la Taj-nacia Aŭtonoma Subprovinco Xishuangbanna, Yunnan-provinco, sudokcidenta Ĉinio, vivas taj-oj, han-oj, hani-oj, lahu-oj, ji-oj, blang-oj, ĝino-oj, jaŭ-oj kaj aliaj 5 nacioj, entute 280 000 loĝantoj, kies trionon konsistigas taj-oj. Ili havas sian propran lingvon ne nur parolan, sed ankaŭ skriban. Krome, preskaŭ ili ĉiuj kredas je hinajano. Pro tio en ĉiuj tieaj taj-aj vilaĝoj imponas budhisma templo kaj ĉiuj taj-aj infanoj devas vivi monaĥan vivon en la templo dum kelkaj jaroj. Por ili, templo ja estas lernejo, kie ili lernas legi kaj skribi.

Tamen ĉi tie mi ne konigos taj-ojn, nek budhismon, je kiu ili kredas, sed islamanojn vivantajn en Xishuangbanna kaj islamon, je kiu ili kredas. En Xishuangbanna kvankam la nombro de islamanoj estas malgranda, tamen, influate de taj-a kulturo kaj religia kredo, la islamanoj ankoraŭ konservas siajn naciajn morojn kaj islamajn tradiciojn, kredas je la religia doktrino, observas islamajn regulojn kaj tabuojn. Tie majestas moskeo, kie imamo instruas islamajn sci-ojn. El ĉio tio formiĝis aparta kultura fenomeno, multe atentata de la socio.

En Xishuangbanna la islamanoj loĝas ĉefe en du vilaĝoj de Menghai-gubernio. La tieaj taj-oj nomas ilin *Pasitaj*. *Pasi* signifas taj-lingve imposton, ĉar iliaj prapatroj iam veturis kune kun siaj karavanoj tra

la loko al Birmo kaj Tajlando por komercado. Ĉi tie ili pagis imposton al la loka registaro. Oni diras, ke huj-a komercisto Ma Bofang en sia komerca vojaĝo edziĝis al taja knabino kaj loĝis kune kun siaj bogepatroj. Tamen pro diferenco de la naciaj kutimoj kaj religiaj tradicioj, li disiĝis de ili kaj enloĝiĝis en nova bambua domo. Post tio ankaŭ iuj aliaj huj-oj transloĝiĝis ĉi tien kaj formiĝis iom post iom islama vilaĝo.

La religia koncepto, kutimoj kaj moroj de *pasitaj* diferencas ne nur de tiuj de la proksimaj taj-oj, sed ankaŭ de tiuj de alilokaj islamanoj. Ili solenas Korban-feston, Fasto-rompan Feston kaj Mahometonaskon, sed neniun taj-an feston, inkl. de la plej solena Akvoverŝa Festo de taj-oj. Sed ili alte taksas la Printempan Feston, la plej gravan por la ĉina popolo. Samkiel en aliaj lokoj de Ĉinio, antaŭvespere de la Printempa Festo iliaj infanoj ekbruligas petardojn kaj dum la Printempa Festo ili ĉiuj en festaj vestoj vizitas parencojn kaj amikojn. Gejunuloj sin amuzas per balancilo. Ĉiuj familioj pretigas iun apartan dolĉaĵon kaj farĉitajn gluec-farunajn bulojn por regali la vizitantojn. La festado daŭras kelkajn tagojn.

Tamen ili plej alte taksas la tri gravajn islamajn festojn. Tiam ili petas imamojn prezidi en Korano-recitado, preĝado kaj bankedo. Antaŭ la Korano-recitado oni jam metis sur la tablojn gluecan rizaĵon

kaj glasojn kun teo, destinitajn por donacado. Oni kolektiĝas en moskeo, gratulas unu alian. Ili invitas ne nur islamanojn, sed ankaŭ taj-ojn. La mastroj kaj gastoj kuniĝas en vera harmonio. Eĉ en ordinaraj tagoj ili alte taksas Korano-recitadon, tamen kun ia taj-a akcento.

Pro longatempa vivado inter taj-oj, ili estas iagrade influataj de la taj-aj tradicioj, kutimoj kaj kulturo. En ordinaraj tagoj tia influo ja estas evidenta. Malgraŭ tio, estas klara ilia koncepto: "Mi estas islamano." Ili konscie lernas de alilokaj islamanoj la ortodoksajn doktrinojn kaj religiajn ritojn, dank' al tio ili daŭre tenas islamajn doktrinojn, observante tabuojn en la manĝado, akurate solenas la tri islamajn festojn kaj konservas la islamajn kutimojn kaj morojn. Ili observas la vivkutimojn de la antaŭaj generacioj. Tiuflanke la maljunuloj ludas gravan rolon. Ili estas ĉefa forto por daŭrigi la religiajn tradiciojn. Ili obstinas, ke ĉiuj vilaĝanoj nepre devas observi la islamajn morojn kaj kutimojn, ĉar en iliaj okuloj tio estas tre grava por ilia ekzistado.

Tamen ili ne estas izolitaj. En la longa historio ili ĉiam harmonie vivas kun la proksimaj taj-oj, geedziĝas kun ili kaj akceptas novajn konvertiĝintojn, ĝuste pro tio ili pli kaj pli multiĝas. La moroj de amaferoj de la gejunuloj estas similaj al tiuj de la taj-oj: ili konatiĝas unu kun alia en kunvenoj,

gbanna

dum laboroj kaj en diversaj situacioj amikiĝas, fianĉiĝas kaj geedziĝas, tute ne influate de aliaj. Kompreneble ili alte taksas la opiniojn de siaj gepatroj kaj petas ilin aranĝi la nupton. Ĝenerale, antaŭ la nupto la novedzo devas loĝi iatempetate ĉe siaj bogepatroj. En la nupta tago la novedzino venas al sia bogepatra hejmo, eskortate de siaj akompanantinoj. En la geedziĝa ceremonio la novgeedzoj unue petas imamon reciti feliĉigan koranon kaj poste per festeno regalias la ĉesstantojn. Nur post tio la novgeedzoj komencas sian privatan vivon. Se la novedzino estas taj-a, do nur post 2-3 monatoj, kiam ŝi alkiŝiĝas al la islama vivo, imamo recitas al ili la koranon, faras islamaniĝan ceremonion kaj donas baptonomon al la novedzino. Se la novedzo estas taj-a, do li devas vivi en sia bogepatra hejmo post la nupto. Post la islamaniĝa ceremonio li nepre devas observi la islamajn morojn kaj kutimojn, kaj konduki kiel vera islamano.

Imamo donas al novnaskitoj baptonomon tri tagojn post ĝia naskiĝo. Tuj post sia naskiĝo la beboj estas influataj de la religia kredo. ■

Estas bonvenaj represo kaj tradukoj el "El Popola Ĉinio" kun indiko de la fonto, kaj la redakcio kore petas ties specimenon.

Nova Libro Eldonita de la Ĉina Esperanto-Eldonejo



ANALEKTOJ DE KONFUCEO

Konfuceo (551—479 a.K.), samtempulo de Ŝakjamunio, estis granda pensulo, politikisto, edukisto kaj fondinto de konfuceanismo. Lia ideologio longe influis Ĉinion kaj ankaŭ multajn orient-aziajn landojn.

"Analektoj de Konfuceo", la konfuceana Biblio, estas kolekto de diroj kaj faroj de Konfuceo kaj liaj disĉiploj. La libro estis kompilita de disĉiploj de Konfuceo kaj pradisĉiploj post lia forpaso. La libro prezentas la vidpunktojn de Konfuceo pri politiko, filozofio, edukado, etiko, principoj de morala konduto, literaturo kaj arto.

Formato: 15X21 cm. (bind.) 114 paĝoj

Prezo: 14 USD

Sendokosto: 3 USD

Mendu ĉe: Distribua Fako de EPC

Libroservo de UEA

Nia peranto en via lando

SUBE mi konigos interesajn provojn. Ili pruvis, ke rubo kaj bruado ne plu estos malutilaj kaj poluantaj...

ILI KONSTRUITAJ EL RUBO

Rubo-monumento troviĝas en iu turisma urbo de Italio. Turistoj forĵetis tie multege da boteloj de trinkaĵoj kaj eluzitaj skatoloj. Por protekti la belan pejzaĝon oni starigis la monumenton, sur kiu legiĝas "Protektu la naturon". Tie oni eksponas eluzitajn objektojn senescepte elmarigitajn.

UTILIGO DE BRUO

Por sterkado. Ekscitite de bruoj, poroj de radikoj, tigoj kaj folioj de iuj plantoj dilatiĝas ĝis ekstremeco, pro kio ili facile asimilas sterkon. Sciencisto faris jenan provon: En eksperimenta parcelo oni 30-foje ekscitis tomaton per aŭtomobila sirenado kun 100 decibeloj kaj samtempe sterkis la plantojn kaj ŝprucigis sur ilin nutraĵojn. Rezulte la tomatoj rikoltiĝis abunde, kaj ĉiu tomato estis je 1/3 pli granda ol la ordinaraj. La sciencisto trovis ankaŭ,

QING ZI:

Rubo kaj bruoj utiligeblaj

Rubo-skulptaĵoj estis zorgeme faritaj de germana skulptisto el eluzita papero, difektitaj aŭtomobiloj, maŝinoj kaj konstruaj materialoj. Li faris dekojn da montoj kaj aliaj artaĵoj el rubo.

Rubo-kinejo estis starigita antaŭ nelonge en Britio. Ĝia ekrano estis farita el 280 000 eluzitaj tol-pecoj kaj ĝiaj 2 800 seĝoj el armaturo de 45 000 feraj stangoj kaj 500 kg da cemento.

Rubo-golfejo troviĝas en Tokio. Oni kolektis 1 800 tunojn da rubo kaj asignis 42 milionojn da usonaj dolaroj por konstrui tiun publikan golfejon.

Rubo-parko troviĝas en Florido, Usono. Tie ĉiuj amuzaj instalaĵoj estis faritaj el rubo.

Senbruiga rubo-muro estis konstruita de iu kompanio en Hesio, Germanio. Ĝi devis trakti 2 milionojn da tunoj da laktboteloj, lesivboteloj kaj eluzita plasta membrano ĉiujare. Oni do konstruis la kavan muron ĉirkaŭ la sidejo de la kompanio kaj plenigis ĝin per dispecigita rubo kaj fine kovris ĝin supron per tero. Sur la muro oni plantis florojn kaj herbojn. Tiu muro 320 m longa kaj 3 m alta povas enteni 100 000 kg da plasta rubo. La muro, imuna kontraŭ bruoj, estas nomata senbruiga muro.

Rubo-ŝoseoj estas plurspecaj. Germana sciencisto miksis dispecigitajn eluzitajn tolojn kun betono kaj faris el la miksaĵoj elastan betonon, kiu estas taŭga por kovri ŝoseon. Usona sciencisto faris platan likvaĵon el rubo kaj per tia likvaĵo kovris ŝoseon. Tia ŝoseo estas firma kaj akomodigita al la temperatura ŝanĝiĝo.

ke bruoj estas utilaj ankaŭ por kreskado de terpomo, sezamo kaj rizo kaj por ilia pliproduktado.

Por sarkado. Sciencistoj trovis, ke la plantoj estas sentemaj al bruoj kun malsamaj ondoj. Surbaze de tio ili faris bruantan sarkilon, kies sono estas utila al frua ĝermado de la herbosejoj. Pro tio oni povas sarki kampojn per ia kemiaĵo antaŭ ol kresko de plantoj.

Por mezuri temperaturon. La homa temperaturo ŝanĝiĝas pro malsano de iu korpoparto, tiam ŝanĝiĝas ankaŭ la sono estigita de la varma ondo. Kuracistoj povas koni la konkretan lokon de la malsana korpoparto laŭ la sono. Kompreneble la varma sono estas malforta kaj aŭdebla nur per akustika instrumento.

Por sekigi manĝaĵojn. Usonanoj "bombardas" rapidege manĝaĵojn per bruoj kaj malaltfrekvencaj ondoj, kies akvosorba efiko estas 4-10-oble pli granda ol tiu per ordinara sekiga tekniko.

Por ŝanĝi bruon en elektron. Sciencisto proponis konstrui apartan muron ambaŭflanke de la ŝoseoj por sorbi bruon kaj ŝanĝi ĝin en energion. Se la propono efektiviĝos, kontentiĝos la bezono de strata lumigo.

Por ĉasado. Korea sciencisto inventis bruegantan fusilon, kiu povas svenigi ĉasaĵon per sia forta kaj kurta bruego.

Por senpolvigo. La altenergia bruoj povas masigi polvojn, kiuj falas pro peziĝo. La senpolviga alarmilo inventita surbaze de tiu teorio povas senpolvigi fumtubojn kaj regi polvojn en alt-temperatura, alttensia kaj altkoroda medio. ■

Virino en mamnutrado

(Novelo)

EN la urbeto Duanqiao (Düanĉjaŭ), Wang Wang loĝas kontraŭ la domo de Bofratino Hui, trans ŝtona strateto. La domo de Bofratino Hui sidas kun la dorso al monto, kaj tiu de Wang Wang — al rivero. Wang Wang estas 7-jara knabo. Li ĉiam portas en mano sake-ton da biskvitoj kun marko “Wang Wang”, tial oni nomas lin Wang Wang. Denaske Wang Wang vivas kun la avo. Liaj gepatroj sin okupas pri transportado en trenŝipo kaj multe enspezas. La patrino diris, ke la mono nur sufiĉas por Wang Wang viziti universitaton; kaj post kiam la perlaborita mono sufiĉos por li aĉeti domon kaj edziĝi, ili hejmen revenos kaj funkciigos butikon de sojo. Por la navigantaj geedzoj, la urbeto Duanqiao iom post iom fariĝas ia koncepto en la memoro kaj fora adreso sur poŝtmandatoj, kiel infanoj de la maljuna vidvo kaj gepatroj de Wang Wang.

Nenifara, Wang Wang kun biskvita saketo en mano, sidante sur la ŝtona sojlo de la domo, rigardas la pasantojn. La patro ĉiam tiel notis sur la poŝtmandatoj: “Unu sakon da biskvitoj Wang Wang ĉiutage.” Sidante sur la sojlo, Wang Wang ankaŭ gardas por Bofratino Hui la butikon en la teretaĝo de ŝia domo. Kiam venas kliento, li laŭte krias, kaj el la malantaŭo elpaŝas la ridanta Bofratino Hui.

Antaŭe Bofratino Hui sin vivtenis per portempa laboro ekster la urbeto. Ŝi revenis por akuŝi. Ŝia bebo nun estas en mamsuĉado. Wang Wang neniam gustumis lakton de sia patrino. La avo diris, ke ŝi tute ne havis lakton. Nur unufoje Wang Wang tenis en la buŝo mampinton de la patrino. Nenion li elsuĉis, kaj la patrino jam kriis pro doloro. Ne longe poste la patrino portis lin al la avino, kiu tiam ankoraŭ vivis. Kune kun Wang Wang venis ankaŭ bovlo kaj kulero el nerustiĝa ŝtalo. La avino miksis en la bovlo kukon, bovinan lakton, ovoflavon kaj sojfaban farunon kaj manĝigis ilin al Wang Wang per la kulero. Wang Wang ĉiam ridis post la manĝado. Kiel diris la avino, Wang Wang estas pli forta ol tiuj mamnutritaj knaboj. Tamen la avo ofte diris, ke al la nunaj virinoj mankas lakto.

Sed Bofratino Hui ne estas tia. Ŝi estas malalta kaj dika, ŝia vizaĝo aspektas kiel plenluno. Ŝi kutimas ridi je renkontiĝo kun aliaj. Kiam ŝi ri-

das, ambaŭflanke de ŝia malsupra lipo aperas du malgrandaj kavetoj, plenaj de feliĉo de mamnutrado. Ŝia korpo elsendas aromon de lakto, densan, longdaŭran, kvazaŭ malaperintan kiam vi forte enflaras. Belas la sceno ke ŝi mamnutras la bebon. Ĉiufoje, sidante ekstere de la butikoj, ŝi levas la veston, kuŝigas la kapon de la bebo en sia kubutkavo kaj alproksimigas al ĝi la mamojn. Post kiam la bebo tenas en la buŝo la mampinton, rerektiĝas ŝia supra korpo. Dum la mamnutrado ŝi ŝatas karesi la etajn ungojn kaj orelajn lombojn de la bebo. Kiam oni venas por aĉeti, ŝi diras: “Vi mem prenu.” Kiam necesas havigi al aĉetanto apunton, ŝi diras la samon: “Vi mem prenu.” Jam de longa tempo Wang Wang observas la belan pozon de Bofratino Hui dum la mamnutrado. Ŝiaj mamoj radias tro multe da patrineco pro abundo da lakto, ŝiaj lazuraj vejnoj sin kaŝas sub ŝia haŭto. Wang Wang firme kredas, ke la lakto de Bofratino Hui ĝuste estas lazura, varmeta kaj refreŝiga. Dum suĉado la bebo ĉiam apogas sian manon sur mammo de la panjo. En la lumo de la suno la delikataj mano kaj mammo fariĝas kvazaŭ diafanaj. Ŝajne ili ne estas prilumataj de la suno, sed mem povas elradii sunlumon. La mamnutrado sentigas al Wang Wang sopiron kaj malĝojon. Li estas ĉirkaŭita de lakta aromo, lia malĝojo estas tiel malforta, tiel longdaŭra kiel la lakta aromo.

Bofratino Hui tute ne atendas, ke Wang Wang povas fari tian skandalon. Ŝi mamnutras la bebon, sidante sur la sojlo, kontraŭe Wang Wang sidas trans la strateto. Suĉinte unu mamon, la bebo satiĝas. Kiam la panjo donas al ĝi la alian mamon, ĝi deturnas la kapon kaj elbuŝigas laktan ŝaŭmon. La mammo ŝvele doloras, Bofratino Hui permane elpremas iom da lakto... Tion Wang Wang fikse rigardas. Li vidas, ke strio da blanka lakto ŝprucas sur la muron kaj estas sorbita de la briko. Li flarsentas la laktan aromon, senbrue paŝas tien kaj sin kaŝas en la murangulo. Bofratino Hui ne rimarkas Wang Wang. Flanken puŝinte la manon de la bebo, Wang Wang klinas sian kapon kaj ekmordas la mamon firme. Akra krio de Bofratino Hui aŭdiĝas subite kaj daŭre en la ŝtona strateto. Sen la krio, Wang Wang certe ne ĉesus mordi. Li ne forkuras, sed staras kun gapa mieno. Li vidas lunarkan postsig-

non de dentoj kaj sangon sur la dekstra mamu. Bofratino Hui rekonsciigas. Antaŭ ol ŝi trankviligas la konsternitan bebĉon, alvenas najbaroj. Dolorita kaj honta, ŝi riproĉas: “Wang Wang, vi damninda!”

Tuj posttagmeze la novaĵo disvastiĝas en la tuta urbeto sen gazetaro. Nature homoj diras tion kaj alion: “Terure, nur sep-jara tion faris.” “Eĉ la plenaĝuloj de Duanqiao-urbeto neniam tiel friponis.” Fakte ili estas gajaj kaj scivolemaj. Ĉiuj jam scias, ke mamu de Bofratino Hui estas mordita de Wang Wang. Iuj ŝerce citas la reklamo-vortojn de biskvito “Wang Wang” en televido: “Bofratino Hui, ĉiuj estu Wang Wang.” (Ĉinlingve la ideogramo “Wang” signifas “prospera”). Oni ridas, ankaŭ Bofratino Hui ridas. Tamen ne ĝojas ŝia bopatrino, kiu eldomiĝas kun tirita vizaĝo: “La akvo bolis.”

Tiun vesperon Wang Wang ne volas manĝi. La avo manĝigas lin kun kanzono, kiun la avo mem verkis: “Buŝon da ovaĵo, buŝon da viando. Multe da enspezo, poste en estonto.” Tamen, kiam venas de dekstre la kulero, sin turnas maldekstren la nepo; kiam venas de maldekstre la kulero, li direktas sin inverse. Liaj okuloj fikse rigardas la domon de Bofratino Hui, en kies butikoj estas diversaj manĝaĵoj. La avo demandas: “Kion vi volas?” La knabo silentas. La avo demandas: “Ĉokoladon? Ladkaĉon kun konfitaĵoj?” La knabo ne respondas. La avo demandas: “Ĉu vi volas lakton?” Wang Wang returnas la kapon, kun okuloj plenaj de larmoj. La avo komprenas, ke la nepo deziras lakton. Li iras aĉeti sakon da laktopulvoro kaj infuzas ĝin per bolinta akvo por trinki la nepon. Wang Wang mordas la kuleron kaj faligas ĝin sur la plankon. Plie li renversas la bovlon. La bovlo ruliĝas sur la ŝtona planko, kaj aŭdiĝas ĝia tintsonado.

Post vespermanĝo la avo renkontas Avon Liu la Trian sur la ŝtona kajo ekster la suda pordo de sia domo. La lasta strange ridas tuj kiam li vidas la avon de Wang Wang: “Avo Wang, via nepo flirtis kun Bofratino Hui, ĉu vi instigis lin?” La avo de Wang Wang ne komprenas, tamen li legas ion malbonan el liaj haŭt-sulkoj. Avo Liu la Tria ĵetas rigardon al li kaj frustras: “Posttagmeze via nepo mordis mamon de Bofratino Hui. Ŝi sangis!”

Tondras en la kapo de la avo de Wang Wang. Kiel terure! Li returne prenas balailon kaj donas 3-4 frapojn al la postaĵon de la nepo. La knabo ne ploras. Larmoj plenigas la okulojn, kaj unu larmoguto falas; larmoj replenigas la okulojn, kaj refoje unu larmoguto falas. Liaj silento kaj larmoj estas eksterordinare doloraj kaj malĝojigaj. La avo forlasas la balailon kaj serioze riproĉas: “Kiu in-

struis vin? Kiu besto instigis vin?” Wang Wang silentas. Li klinas la kapon, kun larmoj falantaj guton post gutoj. La avo veas: “Malgraŭ tio, la Printempa Festo venos post sep monatoj.”

Ĉiujare en la Printempa Festo la gepatroj de Wang Wang revenis hejmen por 6 tagoj. Ĉiufoje la patrino preparis multe da emocio. Ŝi brakumis kaj kisis Wang Wang tuj kiam ŝi vidis lin. Tio estas iom fremda por Wang Wang. Brakumite de la panjo, li sentis doloreton kaj sinĝenon. Iomete li intencis rifuzi kaj barakti. Poste la gepatroj donis al li multajn bongustaĵojn kaj ludilojn, kio feliĉigis lin. Li ofte senbride manĝis ĝis la stomako doloris. Du aŭ tri tagojn poste, Wang Wang komencis koni kaj ŝati la gepatrojn, ŝatis iliajn voĉon kaj odoron. Pro ŝato li volis tute alproksimiĝi al ili, tamen ĉiufoje, kiam li komencis alproksimiĝi, ili subite malaperis...

En la sekvantaj tagoj Bofratino Hui ne vidas Wang Wang. En la tagmezo, vidinte lian avon, ŝi demandas: “Avo Wang, kial ne vidiĝas Wang Wang?” En la lastaj tagoj la avo ne havis la kuraĝon rigardi Bofratinon Hui. Se ankaŭ ŝi opinias kiel Avo Liu la Tria, li perdos la vizaĝon. Tamen finfine li ne povas eviti ŝin. Liaj maljunaj okuloj ne kuraĝas rigardi ŝin:

“Li ricevas hospitalo.”

“Kio kuŝas en hospitalo?”

“Li seri-

“Vi lin?”

“Sen

riproĉo

li ne

okazis? Kial li pitalo?”

“oze febris.”

riproĉis



komprenos,” la avo hontas.

“Kion vi diras, Avo Wang? Kion malbonan povas fari sepjara knabo?” ŝi kuŝigas la bebĉon en alian brakon.

“Sen riproĉo li ne prudentiĝos.”

“Li ne vundis min. Nur iom da haŭto, sed re-

saniĝis.”


“Mi neniam instigis lin. Kulpas la televidaj programoj,” la avo refoje klinas la kapon kaj ruĝiĝas.

Elhospitaliĝinte, Wang Wang malgrasiĝas. Pli grandiĝas liaj okuloj, ankaŭ duobliĝas liaj palpebroj. Li fariĝas iom kvieta, ne tiel petola kiel antaŭe. Bofratino Hui diras: “Post malsano Wang Wang pli bele aspektas.” La knabo ne plu sidas sur la sojlo. Ŝi supozas, ke tio estas nova tabuo de lia avo. Tamen ŝi scias, ke Wang Wang sin kaŝas post la pordo por rigardi ŝin mam-

Liaj nigraj okuloj ĉiam malĝoje en iu truon aŭ tra iu de la l o . avo la-

al-prok-simiĝi al Bofratino Hui, kio do-

nutradi. flagras fendo tabu- L a n e s a s Wang Wang



knabo fantomo.

loras ŝin. La senbrue vagas kiel Foje Bofratino Hui kun la bebo en la brako donacas bombonojn al li. Ŝi diras, imitante la voĉon de sia bebo: “Kie estas frato Wang Wang? Ni petas lin ĝui la bombonojn.” Vidinte ŝin, Wang Wang sin kaŝas post la ŝtuparo. La

avo haltigas ŝin: “Ne faru tion.” Ŝi estas barita kaj forgesas imiti la voĉon de la bebo: “Nur iom da bombonoj.” La avo serioze diras: “Ne faru tion.” Antaŭ ol foriri, ŝi returnas la kapon kaj rigardas Wang Wang. La rigardo de la knabo malĝojigos ĉiujn virinojn, kiuj patrinigiĝis.

“Venu, Wang Wang,” ŝi diras.

“Wang Wang!” la avo serioziĝas.

“Avo Wang, kion vi volas?”

Tamen, certe Wang Wang kaŝe rigardadas. Tiun sekreton scias nur Wang Wang kaj Bofratino Hui. Sen forigi la baron, freneziĝos aŭ Wang Wang aŭ Bofratino Hui.

La avo ronkas eĉ en tagmeza dormo. Tuj kiam aŭdiĝas la ronko, Wang Wang kuras malsupren al la teretaĝo kaj kliniĝas al la tabulo por rigardi Bofratinon Hui. Ŝi kaptas lin je la pojno kaj flustras al li: “Ne timu, sekvu min.” Wang Wang estas tiritita en la malantaŭan korton de la butikoj. Li spiregas, iomete timema, ĉirkaŭita de lakta aromo. Bofratino Hui kaŭriĝas, levas la veston, karesas lian kapon kaj mildvoĉe diras: “Suĉu.” Wang Wang ne kuraĝas sin movi. La de li sopirata patrineca mammo estas tiel proksima, ĝuste sub lia nazpinto. Li levas la kapon, kun larmoj en la okuloj, honte kaj timeme. Bofratino Hui diras: “Suĉu — ne mordu, tenu en la buŝo, malrapide suĉu.” Wang Wang alproksimigas sian kapon, liaj du manetoj leviĝas malrapide al ŝia dekstra mammo, sed tuj ĉesas en la lasta momento.

“Ne,” li diras korpremite.

“Stultulo, la bebo ne povas elĉerpi,” ŝi konsolas lin.

El la okuloj de Wang Wang elfluas larmoj, kiuj elsendas sesangulan brilon en la sunlumo. Rigardante la mamojn, li ploras kaj forkuras: “Ne! Vi ne estas mia patrino!” Sekvante lin, Bofratino Hui krias: “Wang Wang, Wang Wang...” Wang Wang fuĝas en sian domon kaj riglas la pordon. La procezo fariĝas ĉielskua en la kvieta tagmezo. Bofratino Hui frapas je la pordo kaj krias, kvazaŭ plorante: “Wang Wang!”

Silento regas en la domo. Momenton poste ĉesas la ronko de la avo, kaj aŭdiĝas urĝaj paŝoj malsupren laŭ la ŝtuparo. Poste aŭdiĝas el la domo sufokaj sonoj de mezurilo frapanta karnon. Bofratino Hui, staranta en la sama loko, malĝoje krias: “Avo Wang, Avo Wang!”

Svarmiĝas homoj. Ili tuj konjektas, ke Wang Wang refoje faris skandalon. Iu serioze diras: “Tiu malgranda aĉulo, nerebonigebla!”

Bofratino Hui returnas la kapon kun larmoj ruliĝantaj sur la vizaĝo. Ŝi kolere krias kvazaŭ bestino: “For! For! Kion vi scias?”

Elĉinigi **XIANG HONG**

ŜANGĤIGO DE ĈINAJ FASONOJ

Iam antaŭe preskaŭ ĉiuj ĉinoj portis sur si bluan aŭ grizan kostumon. Iu junulo konfesis, ke en lia memoro antaŭ dekelkaj jaroj belaj virinoj ĉiam portis malhelkoloran kostumon kun blanka kolumo ekstere refaldita. Tio kaŭziĝis unue de katenado de fermita pensmaniero kaj due de postĝinta ekonomio kaj malalta vivnivelo. Tiam Ĉinio ĉiujare produktis po unu veston por la ĉinoj. Nun, la dekelkjaraj infanoj neniel kredas, ke iliaj gepatroj iam portis tian kostumon, ĉar hodiaŭ ili alfrontas buntan mondon. Estas videble, ke nun ĉinoj ne plu estas katenataj de diversaj tabuoj. Ili povas laŭvole sin vesti. Belajn vestojn portas ne nur gejunuloj, sed ankaŭ gemaljunuloj. Kun plibonigo de la ekonomiaj kondiĉoj kaj ĉiam pligrandiganta bezono de vestoj, la ĉina konfekcio faris grandan progreson. Nun en Ĉinio funkcias 44 000 konfekciejoj kun jara produktokvanto de 8 miliardoj da vestoj.

En Ĉinio cirkulis popoldiro: “Novan veston oni portas tri jarojn. Post kiam ĝi malnoviĝas, oni portas ĝin aliajn tri jarojn. Post ĝia flikado — pliajn tri jarojn.” Nun ĝi jam malaperis. La geknaboj ne plu portas malnovajn vestojn de siaj pliaĝaj gefratoj. Gejunuloj vestas sin laŭ sia individueco; virinoj vestas sin laŭmode. La elspezo de ĉinoj por vestoj ĉiam pligrandiĝas kaj nun jam konsistigas pli ol 17% de la totala elspezo.

Oni postulas malsamajn vestojn pro diferenco de la aĝoj kaj profesioj. La gejunuloj ŝatas famajn markojn kaj modajn vestojn, dum la gemaljunuloj alte taksas kvaliton de la ŝtofo. En la lastaj jaroj ĉu junaj ĉu maljunaj ĉiuj preferas komfortajn vestojn, sekve de tio ekfuroris la tiel nomataj malpezaj kaj iom lozaj vestoj.

SMERALDA SKULPTAĴO “MAJESTA ĈINIO”

Oni diras, ke “oro estas valora, dum jado senpreza”, kaj smeraldo estas la plej bona specio de la jadoj. Lastatempe la Pekina Jadaĵ-fabriko faris smeraldan skulptaĵon “Majesta Ĉinio”. Tiu rara metiartaĵo pezas pli ol 900 kg kaj altas 1.33 m. Ĝia kruda materialo havis eksterordinaran originon.

La smeraldo havas du speciojn, t.e. montan kaj delikatan. La monta estas ekspluatita en monto sen efloreska eksteraĵo. La delikata troviĝas en fluejo, montdeklivo k.a., en formo de gruzo pro longatempa natura eroziado kaj kun efloreska eksteraĵo. Ĝenerale dirite la delikata estas multe

pli bona ol la monta.

Jiang Wenbin, projektinto de la “Majesta Ĉinio”, diris, ke ĝenerale oni havas nur 50% aŭ maksimume 60-70% da certeco pri la kvalito de smeraldo. Se oni sukcese aĉetis trezoron, oni povis tuj fariĝi milionulo. Se oni maltrafis, oni do perdis sian tutan elspezon.

Antaŭ du jaroj s-ro Jiang Wenbin trovis tiun delikatan smeraldon en Yunnan-provinco, ĉe la limo inter Ĉinio kaj Birmo. Li ne estis tre certa, tamen li aĉetis ĝin kontraŭ alta prezo. Ĝi, 1 000 kg peza, estis transportita en Pekinon. Oni komencis forigi ĝian eksteraĵon. Ĉe la sono de ĝia segado lia koro maltrankvile batis. Post la unuataga segado ĝia verda supro malkovriĝis. Maljuna metiisto diris kun rideto: “Jiang, la elspezo estas almenaŭ kovrita!” En la okataga segado aperis grandega bela smeraldo. Antaŭ la bluverda, delikata kaj glata smeraldo Jiang sentis elkoran ĝojon.

La “Majesta Ĉinio” plenumiĝis post dujara skulptado. Sur la smeraldo serpentumas la Granda Muro, ondas la Flava Rivero kaj majestas multaj aliaj belaj pejzaĝoj de Ĉinio.

ĜOJA RENKONTIĜO DE KVARĜEMELOJ

Ĉi-maje 44 kvarĝemeloj el 8 provincoj kaj municipoj de Ĉinio ĝoje renkontiĝis en Ŝanhajo. Inter ili la plej aĝaj estas 35-jaraj ŝanhaj-anoj, kaj la plej junaj — unu-jaraj, venis el Hebei-provinco.

En scienca dokumento legiĝas, ke post ĉiu



Kvarĝemeloj

704969-a gravediĝo okazas unu akuŝo de kvarĝemeloj. Ilia vivo kaj kresko havas striktan rilaton kun la ekonomia kaj kuraca kondiĉoj. Laŭ nekompleta statistiko estas 32 familioj kun kvarĝemeloj en Ĉinio, El kiuj 5 troviĝas en Hongkong kaj Taiwan. En la lastaj jaroj en Ĉinio la naskokvanto de kvarĝemeloj evidente kreskis, sole en 1996

naskiĝis 8 kvarĝemeloj.

Kvarĝemelaj familioj estas eksterordinara en la mondo, tial ili estas aparte atentataj de la socio. Antaŭ 18 jaroj kamparanino Cui Yuhua de Hunan-provinco naskis en 55 minutoj kvarĝemelojn: du filinojn kaj du filojn. Ordinara kamparana familio unu-foje akceptis kvar bebojn. Tio estis granda ŝarĝo. Kiam la geedzoj sentis kaj ĝojon kaj malĝojon, la loka registaro decidis doni al ili ĉiumonate fiksan monsumon por nutri la bebojn. Ankaŭ la tiama prezidanto de la Ĉina Virina Federacio kaj iuj famaj ĉinaj pediatroj sendis monon al ili.

Tiel pasis la jaroj. La kvar infanoj kreskis en element-lernejojn kaj mez-lernejojn. Post kiam ili eniris mezlernejojn, la gubernia registaro monhelpis ilin, por ke ili plenumu sian lernadon. Nun la du knabinoj baldaŭ diplomiĝos el financa lernejo, dum la du knaboj volas fariĝi ŝoforoj.

Ĉi-foje, la kvarĝemeloj veturis al Ŝanhajo kune kun siaj gepatroj. Ili kaj aliaj kvarĝemelaj familioj akceptis donacaĵon de iuj entreprenoj kaj vizitis la pitoreskan urbon Ŝanhajo. La gepatroj de la kvarĝemeloj interŝanĝis spertojn pri vartado de siaj kvarĝemeloj.


AŬTE FLUGI TRANS LA FLAVAN RIVERON

La 1-an de junio Ke Shouliang, fama kiel "azia flughomo", de Taiwan-provinco, Ĉinio, per personaŭto sukcese flugis trans la Flavan Riveron. Per tio li kreis alian rekordon kaj metis finan punkton en sia "fluga" vivo. En 1992 li flugis trans la Grandan Muron per motoro en Pekino.

Hukou-akvofalo troviĝas ĉe la limo inter la provincoj Shaanxi (Ŝenŝji) kaj Shanxi (Ŝanŝji). La muĝanta Flava Rivero tie falas de la loko 30 m alta malsupren en la rokan valon, 60 m larĝan, levante akvonebulon altan je 50 m.

Ĉi-foje Ke Shouliang aŭte flugis ĉ. 50 m en la aero. La starta kurejo longis 265 m, larĝis 5 m kaj la falkurejo longis 50 m kaj larĝis 10 m. La tuta kurejo estis konstruita el ŝtaltuboj kaj lignaj tabuloj.

La 1-an de junio sur la krutaĵoj ambaŭflanke de la akvofalo kolektiĝis miloj da rigardantoj. Helpe de sia kamarado, Ke Shouliang eniris en blankan aŭton. Li startigis sian aŭton kaj kuris sur la kurejon, sed li subite haltis kaj reveturis al la startpunkto. Post momento li denove kuregis sur la kurejon, abrupte rapidigis sin kaj ekflugis. Jen li sukcesis flugi trans la Flavan Riveron. En ape-naŭ du sekundoj li kreis miraklon... Kiam li, helpe de la laborantoj, eliris el la aŭto, droninta profunde sub la kurejo, li tiel emociiĝis, ke li ne sciis kion diri.



Fotografio

Karikaturo de SHI NUPEI

Amoplena “familio”

EN la okuloj de multaj homoj la patrina amo estas plej nobla. En la Infana Bonstatiga Instituto de Tianjin oni profunde sentas tian amon. 200 infanoj, kiuj vivas tie, havas ne nur afablajn ĉinajn “patrinojn”, sed ankaŭ zorgemajn fremdlandajn “patrinojn”.

Instruistino Wang Wenling laboris tie 35 jarojn. Multaj infanoj, kiujn ŝi flegis, jam fariĝis plenkreskuloj. Nutrante infanon per lakto, ŝi diris al mi: “Ĉe ni la infanoj plejparte estas forĵetitaj de sia familio pro kripaleco, kaj flegi ilin estas malfacile. Por nutri leporlipajn infanojn mi multe ŝvitas. Mi ofte pensas, ke ili pli bezonas amon. Infanece mi mem perdis la amon de la patrino, nun mi volas ke ili havu tian amon.” Instruistino Wang ja kreskis en la institucio.

Wang estas malalta kaj tre bonkora. Dum la pasintaj 35 jaroj ŝi tenis sian promeson: dediĉi sian vivon al tiuj infanoj. Post kiam ŝi havas familion kaj infanon, ŝi ankoraŭ pasigas ĉiun ferion kune kun la infanoj de la institucio.

Iu orfino, nomata Xia Jun, estis

unu-monata, kiam ŝi venis tien. Ŝi suferis de serioza kormalsano kaj ne povis stari, kiam ŝi estis 3-jara. Ŝi kreskis preskaŭ en la sino de Wang. Poste iu hospitalo operaciis ŝin. Kiam mi vidis ŝin, ŝi

volontuloj. Ili estas edzinoj de laborantoj de komercaj oficejoj de Aŭstralio, Usono, Britio kaj Germanio en Ĉinio. Iuj el ili, kiuj loĝas en Tianjin, laboras tie preskaŭ ĉiutage, kaj aliaj, kiuj



S-ino Wang Wenling trinkigas bebon.

jam fariĝis sagaca lernantino. Parolante pri la bonstatiga institucio kaj instruistino Wang, ŝi montris dankemon. Ŝi diris al mi, ke same kiel aliaj infanoj, kiuj kreskis tie, ŝi ofte vizitis la “patrinojn” kaj babilis kun ŝi.

En brila infanejo mi vidis kelkajn okupitajn fremdlandajn “patrinojn”. Ili diris al mi, ke ekde 1988 servas tie 30 alilandanoj kiel

loĝas malproksime, venas kelkajn fojojn ĉiusemajne. Ili banas kaj nutras la infanojn. Per kolekto de mondonaco ili helpas plibonigi la vivkondiĉojn de la institucio, akurate liveras laktopulvoron kaj aĉetas ludilojn. La ĉefino de la volontuloj diris, ke kiam ŝi unuafoje venis tien, ŝi rimarkis ke ne nur la loĝejo, sed ankaŭ la ekipaĵoj estas simplaj. Sed

ili ĉiuj memoras ke Ĉinio estas evoluanta, tial ili volas plibonigi la situacion en kunlaboro.

9 jaroj pasis. Kiam iuj forlasis Ĉinion, aliaj daŭrigis la laboron. Inter la unuaj volontuloj estas edzino de inĝeniero. Kiam ŝi unuafoje venis tien, ŝi rimarkis infanon suferantan de denaska haŭtomalsano. Anstataŭ timi ŝi tuj brakumis lin, aĉetis por li rulseĝon, ofte kondukis lin ekster la domon por sunumi. Ŝia sincera amo varmigis la infanon, kiu neniam ridis, kaj li finfine ridis.

Por savi infanon suferantan de albinismo, sinjorino Clak kune kun sia edzo ne nur pagis por lia kuraco, sed ankaŭ portis lin en sian hejmon. Kiam ŝi havas propran infanon, oni konsilis al ŝi redoni la infanon, sed ŝi rifuzis. Poste ŝi adoptis la blankharan infanon laŭ ĉina leĝo kaj kunportis lin en la hejmlandon.

S-ro Yan, direktoro de la institucio, diris, ke la infanoj akiris specialan zorgon kaj amon de sia registaro kaj diversaj soci-tavoloj. La monsumo, asignita de la registaro, povas garanti tiu ke ilia vivnivelo estos same alta kiel tiu de la ordinara popolo. Sed pro ilia facila malsaniĝo kaj kriplice la institucio pagas pli multe por iliaj vivtenado, flegado kaj kuracado. Jen kial la institucio petas mondonacon de la socio.

Malgraŭ multe da malfaciloj la instruistoj tutkore servas al la infanoj. Ili faras ĉion eblan, por ke la infanoj ricevu bonan kuracadon. En la institucio estas doktoroj, flegistinoj kaj necesaj kuracaj instrumentoj. Oni starigis ĉambrojn de X-radioj, ultrasona diagnozo, elektrokardi-

ografio, akupunkturo kaj masaĝo kaj sportan trejnejon. Krome, la institucio ankaŭ liveras edukajn kondiĉojn. Nun ĝiaj 6 sanaj infanoj jam lernas en ordinara lernejo kaj ĝiaj 18 kriplaj infanoj en diversaj specialaj lernejoj. La institucio invitas instruistojn instrui tiujn infanojn, kiuj ne povas

viziti tiajn lernejojn pro malsano, kaj petas instruistojn kaj flegistinojn tage kaj nokte flegi tiujn infanojn, kiuj ne povas forlasi la liton.

Ĉe la adiaŭo mi pensis, ke ili estas feliĉaj. Mi eĉ enviis ilin pro iliaj "patrinoj", pro ilia akirita amo. ■



Alilandaj "patrinoj"

Mem pagi por sia lernado en altlernejo

EN 1997 la novaj ĉinaj studentoj alfrontas la fakton: mem pagi por sia lernado.

ĜENERALA TENDENCO

Ĉu estas novaĵo, ke studentoj mem pagas por sia lernado? Jes, almenaŭ por la nuna Ĉinio. En la pasintaj pli ol 40 jaroj la ĉinaj studentoj ĝuis senpagan lernadon, eĉ por la manĝo de iuj malriĉaj studentoj pagis la ŝtato. Tamen kun disvolviĝo de la eduka afero la nombro de studentoj kreskis jaro post jaro, kaj la ŝtato estis troŝarĝita de tiel granda eduka elspezo. Evidente, “senpaga sistemo” ne taŭgas por vasta edukado. Sekve, antaŭ dekkelkaj jaroj la altlernejoj, plenuminte sian akcepton de nepagantaj lernantoj, komencis akcepti iujn mempagajn, kies ekzamena poentaro estis iom malpli alta. Tio kontentigis pli da gejunuloj, kiuj deziris viziti altlernejon, kaj certgrade mildigis la streĉan financan situacion de la altlernejoj, tamen tio ne konformas al la eduka principo “ĉiuj egalaj antaŭ la poentaro” kaj malhelpas altigon de la instrua kvalito. Poste Ĉinio ekpraktikis en iuj altlernejoj novan sistemon, sub kiu oni mempage studas. En

1996 estis pli ol 660 altlernejoj, t.e. 2/3 de la ĉinaj altlernejoj, kiuj akceptis ekskluzive mempagajn studentojn. Laŭ siaj kondiĉoj Ĉinio ankoraŭ praktikas senpagan lernadon en la altlernejoj nacia, agrikultura kaj forstuma, normala, sporta kaj mar-naviga.

NENIU MALRIĈA STUDENTO ĈESIGU SIAN LERNADON

Kvankam estas racie, ke la edukatoj en altlernejoj mem pagas por sia lernado, ĉar ili ricevos altan repagon dum la vivo, kio estas internacia kutimo; kvankam ĉiu studento ĉiujare pagas por sia lernado nur tiom, je 25% kiom la eduka kosto, tamen por lia vivteno, liaj libroj kaj kajeroj lia familio devas elspezi ĉ. dekmil juanojn, kion ŝparemaj familioj ankoraŭ povas, kaj la malriĉaj kamparaj kaj urbaj familioj ne povas. Nun 15% el la 3 milionoj da studentoj en 1 050 ĉinaj altlernejoj estas malriĉaj. Pro tio oni maltrankviliĝas, ĉu tiuj nepagipovaj elstaraj studentoj povos daŭrigi sian lernadon.

Pro tio la ŝtato postulas, ke la eduka administracio kaj altlernejoj helpu malriĉajn studentojn daŭrigi la lernadon. Kaj la altlernejoj al-

prenis serion da rimedoj kaj iom post iom starigis la ĉefan monhelpan sistemon kun stipendio, kredito, lukro-fonduso, monhelpo por ege malriĉaj studentoj kaj malpliigo kaj nuligo de la kromaj pagoj por lernado. Jam en la unua studenta tago Wuhan-universitato disdonis stipendion al la elstaraj trapasintoj de la enira ekzameno kaj sendis viziti tiujn malriĉajn trapasintojn, kiuj ne venis al la universitato, kaj doni al ili certan monhelpon.

Transformiĝo de senpaga lernado al mempaga altiris vastan atenton de la socio. Iuj grandaj entreprenoj kaj kompanioj monhelpis la elstarajn studentojn precipe de famaj universitatoj. Ili ne nur donis al la elstaraj studentoj altan stipendion, sed ankaŭ promesis, ke ili povos labori en la kompanio post sia diplomiĝo. Tial la specoj kaj normoj de stipendioj por studentoj ĝenerale pliiĝis.

Post kiam publikiĝis en ĵurnalo la artikolo pri diligenta lernado de Luo Zhimei (Lŭo Ĝimej), ege malriĉa studentino de la Yunan-a Nacia Instituto, ŝi ricevis leteron, en kiu legiĝas: “Mi, kiel montvilaĝa knabo, eniris en altlernejon en la 60-aj jaroj. Mi bone komprenas vin. Kiel pliaĝulo mi

ĉiumonate sendos al vi cent juanojn por via vivtenado.” Post ne-longe tiu bonkorulo akceptis ŝin en sia hejmo kun la intenco, ke ŝi konu lian familion kaj pasigu tie semajfinon. Lia edzino preparis por ŝi abundan manĝon. Ĉe adiaŭo ili donacis al ŝi monon por ŝia duonjara vivtenado. Ŝi ploris de emocio. Ekde tiam ŝi lernas pli diligente. Troviĝas multaj aliaj kiel Luo Zhimei, kiuj ricevis helpon de bonkoruloj. La helpantoj observas la tradicion volonte doni helpon al aliaj, kio montras komunan atenton de la ĉinaj prudentuloj pri la eduka afero.

ANTAŬ DEFIJOJ

podas por havigi al malriĉaj studentoj ŝancon de lukro. Iu universitato en Hubei-provinco aranĝis por malriĉaj studentoj laboron de manĝeja prizorganto. Krom monata salajro ili ricevas ankaŭ senpagan tagmanĝon. Por helpi malriĉajn studentojn, iu universitato kreskigis la nombron de purigistoj de pli ol dek al pli ol cent. Pro tio la universitato ĉiujare elspezas pliajn 100 000 juanojn.

Tamen estas diferencaj la sintenoj de la studentoj pri lernado je la kosto de propra lukro en libertempo. Sufiĉe multaj malriĉaj studentoj ne volas servi kiel purigisto. “Balai? Ne, mi ne volas

lernado.” Responde al tio la instituto organizis diskuton sub la titolo “Kiel mi opinias pri lernado je la kosto de propra lukro en libertempo”. La riĉaj kaj malriĉaj studentoj ĉiuj partoprenis la diskuton. Ili estis tuŝitaj de la varma diskuto. Iu malriĉa studento skribis al sia patro: “Ne plu sendu al mi monon, mi povas vivteni min per mi mem.”

En iu neĝventata vespero studentino Zhang Jinxia (Ĝang Ĝinŝja) kun sakoj granda kaj malgranda surŝultre estis disdonanta leterojn, ĵurnalojn kaj gazetojn al loĝdomoj unu post alia. Ŝi glitfalas sur neĝkovritan teron kaj ploris. Tiam aŭdiĝis kantoj kaj ridoj el halo, kie oni festis la Novjaran Tagon. Ŝi opiniis maljusta la sorton kaj sentis sin kvazaŭ la knabineton vendantan alumetojn en la fabelo de Andersen. Sed fine ŝi stariĝis, rememorante la vortojn de sia instruisto: “Malriĉeco ne timindas, sed timindas homo sen ambicio.” Ŝi diris, ke ekde tiam ambicio akompanos ŝin dum la tuta vivo.

Mempago por lernado antaŭenpuŝas memstarigon. Chen Wansi de Shandong-universitato ĉiutage lukras en libertempo. Kiam ŝi purigas koridoron per peza ŝvabrilo, ŝi sentas lacon, tamen ŝi ĉiam bone plenumas la servon, ĉar ŝi bone scias, ke ŝi faras tion por sia lernado. Ŝi levis sian potentaron de la 56-a loko al la 5-a. Jam en du lernojaroj ŝi ricevis stipendion. Ŝi fidis, ke ŝi povos trapasi la ekzamenon por fariĝi esplor-studento.

Huang Haitao, kiu tage laboris en konstruejo kaj vespere lernis en barako, sukcesis eniri en Hubei-universitaton. Post sia studentigo li laboris kiel familia instruisto, transportisto, ofertisto... Li ne nur plenumis sian lernadon, sed ankaŭ publikigis en ĵurnaloj siajn verkojn kun 100 000 ideogramoj. Li diris: “Iasence malriĉeco estas riĉaĵo, dum sufero — vera universitato.” ■



En someraj ferioj studento (maldekstre) helpas poŝtoŝefojn en abonigo de ĵurnaloj.

Por ŝpari sian elspezon por manĝo, Wang Wanxing (Ŭang Ŭanŝing), ege malriĉa studento de la Ĉina Agronomia Universitato, mem peklis legomojn. Li nenion diris pri sia malfacilo kaj prezentis petskribon pri monhelpo nur post plurfoja persvado de sia instruisto. Li diris, ke li preferas pagi per sia lukrita mono por sia lernado.

La altlernejoj ĉiurimede klo-

perdi mian dignon pro malriĉeco.” diris filo de kamparano. Kaj alia studentino, kiu vivas de vendado de brulligno far sia maljuna patrino, preferas deprunti monon ol servi en biblioteko. La estroj de altlernejoj konsciiĝis, ke ili devas helpi la studentojn ne sole materiale, sed ankaŭ ideologie.

La malriĉaj studentoj de la Centra-Suda Nacia Instituto prezentis devizon: “Mem lukro por

KIEL TRAKTI KRIMADON DE ADOLESKANTOJ?

de WANG HANPING

En kelkaj apudurbaj loĝejoj en Britio — aparte lastatempe — estas huliganismo. Ĉu ankaŭ ĉe vi? Se jes, kio estas via solvo?

HENRY D. PALMER (Britio)

LAŭ la ĉinaj leĝoj la malpli-ol-18-jaraj homoj estas rigardataj kiel adoleskantoj. Pro diversaj kaŭzoj en la socio ekzistas deliktoj kaj krimoj faritaj de ili, el kiuj la plej ofta estas ŝtelado.

En la lastaj 20 jaroj la ĉina socia ekonomio atingis rapidan progreson kaj samtempe kreskis mamonismo kaj egoismo, kontraŭleĝaj pornografiaj eldonaĵoj kaj tiuj pri perfortaĵoj. Tiuj malutilaj sociaj faktoroj influis la adoleskantojn, kiuj kreskas fiziologie kaj psikologie. Pro tio faris deliktojn kaj krimojn iuj junaj homoj, kiuj ne povas sin regi kaj al kiuj mankas familia edukado kaj prizorgo.


Diversaj materialoj konigas, ke leviĝo de la deliktoj kaj krimoj de adoleskantoj estas mondskala socia problemo. Multaj landoj studas tiun problemon por trovi efikan rimedon por solvi ĝin. En Ĉinio ĝi vekis grandan atenton ne nur de la registaro, sed ankaŭ de la publiko.

Laŭ la kriminala kodo de Ĉinio oni devas eduki, edifi kaj savi la 14-18-jarajn krimulojn, observante la principon doni al ili ĉefe edukadon kaj malĉefe punon. Tiu principo speguliĝas ankaŭ en "La Leĝo por Protekti Adoleskantojn" ellaborita antaŭ kelkaj jaroj. La multjara praktiko pruvis, ke surbaze de tiu ĉi principo, starigi kaj kompletigi la juran sistemon koncerne junajn krimulojn, disvolvi la tribunalon pri junulaj krimoj estas unu el la efikaj rimedoj por solvi la problemon.

Ekde la 80-aj jaroj en divers-

nivelaj juĝejoj de Ĉinio aperis specialaj tribunaloj pri junulaj krimoj. Tia tribunalo konsistas el ĉef-juĝisto, juĝisto kaj speciala asesoro, t.e. instruisto aŭ emerita ŝtatoficisto. La tribunalo faras senĉesajn esploradojn kaj praktikadojn por trovi juĝan kaj edukadon rimedojn konvenajn al la adoleskantoj en fiziologio kaj psikologio kaj formas sian propran labor-metodon, t.e. fari enketon antaŭ la juĝado, edukadon dum la juĝado kaj daŭran edukadon post la juĝado.

La enketado antaŭ la juĝado estas konsistiga parto de la juĝado. Respondeculoj de la tribunalo faras enketadon por koni la personajn ecojn de la akuzitoj, ilian bonkonducon en la pasinteco kaj kaŭzon de iliaj krimoj kaj deliktoj kaj post tio ellaboras la rimedon kiel ilin savi kaj juĝi.



Juna krimulo en punlaborado en hospitalo por maljunuloj

La ĉefa tasko de la juĝado estas eduki kaj kombini la punon kun la edukado. La ĉefjuĝisto per milda tono demandas la akuziton kaj samtempe la speciala asesoro, proceduristo, advokato kaj leĝa agento edukas kaj edifas la akuziton de malsamaj starpunktoj por ke ĉi tiu kortuŝiĝu, konfesu sian krimon kaj pentofaru.

Koncerne la kondamnon, la tribunalo strikte observas la kriminalan kodon pri adoleskantoj, t.e. sub la premisoj malsevere puni la adoleskantojn kaj malpliigi al ili la punadon. La tribunalo faras la kondamnon ĉefe laŭ la krimoj mem por ke la puno estu utila por eduki ilin kaj preventi recidivon kaj samtempe ne kaŭzu al ili psikan vundon. Unuvorte, ĉio ĉi tio celas ilian transformadon, studon kaj laboron en la estonteco.

Por firmigi kaj disvolvi la efikon de juĝado, la tribunalo faras sian laboron ankaŭ post la kondamno, t.e. daŭre eduki kaj ekzameni la kondamnitajn kaj viziti ilin. Ĝi organizas personojn por eduki tiujn, kiuj estis kondamnitaj al prokrasto de enkarcerigo, kontrolo kaj ne-punado, ellabori rimedojn por eduki ilin, postuli, ke la adoleskanto-kondamnitaj raportu en la difinita tempo sian ideologian transformadon kaj dum la revizito kaj ekzameno la tribunalaj laborantoj helpas la kondamnitajn en solvo de la problemoj de la studo kaj enoficiĝo.

En malliberejoj kaj punlaborejoj la adoleskanto-kondamnitaj ĉefe lernas labor-teknikojn kaj kulturajn sciojn. La tribunaloj, malliberejoj kaj punlaborejoj havas konstantan kontakton. En revizito en la difinita tempo la tribunalaj laborantoj informiĝas pri ilia transformado, donacas al ili librojn kaj vivbezonaĵojn por ke ili sentu varmon familian kaj socian kaj havu esperon pri laboro kaj vivo post elkarceriĝo.

Por plue eduki la adoleskanto-kondamnitajn oni faras senĉesan laboron por esplori la justican sistemon, utilan al ilia transformado. En la lastaj jaroj koncernaj departementoj de Nankino, Jiangsu-provinco, alprenis novan rimedon por eduki la adoleskantojn-akuzitojn, t.e. en la difinita tempo daŭro la adoleskantoj-akuzitoj estu kontrolataj de la sociaj departementoj kaj post la difinita tempo oni faras la kondamnon laŭ ilia konduto, kaj la rimedo donis kontentigan rezulton.

Por plue disvolvi la edukon efikon de la tribunalo oni fondis centron por eduki adoleskantoj-

kondamnitajn kaj postlaboran juran lernejon. Multaj tribunaloj faras komunan laboron kun la lokaj lernejoj kaj loĝkvartalaj komitatoj. Laborantoj de la tribunalo faras propagandon en la lernejoj kaj loĝkvartaloj, donas jurajn konsultiĝojn kaj proponojn por preventi kaj malpliigi la eventualan krimadon. Por ke pli da adoleskantoj estu efike edukitaj pri juraj scioj, la tribunalo kune kun kon-



Tribunalo, familio, lernejo kaj koncerna departemento en interkonsiliĝo pri savo de juna krimulo

cerna departemento fondis edukon bazon por fari aktivadojn laŭ plano.

En la praktikado oni trovis, ke la laboro de la tribunalo estis limigita. Por plene defendi la interesojn de la adoleskantoj en juro, oni fondis en 1991, en Jiangsu-provinco, tribunalon pri adoleskantaj aferoj, la unuan en Ĉinio, kiu akceptas kriminalajn juĝaferojn, kontraŭleĝajn aferojn kaj la aferojn por ilin protekti kun la celo forigi la kaŭzojn de krimoj. Vicestro de la provinca kortumo kaj estro de la provinca gvidgrupo de la tribunaloj por adoleskantoj-krimuloj, s-ro Song Baolin, diris al mi, ke nun en multaj lokoj fondiĝis sintezaj tribunaloj pri geknabaj juĝaferoj, kaj kun ĉiam pli kompletiĝanta juĝ-sistemo de la adoleskantoj la tribunaloj pri adoleskantaj krimoj eble ludos pli gravan rolon en prevento kaj malpliigo de krimoj de adoleskantoj.


Kompreneble, likvidi krimojn de adoleskantoj estas komplika socia laboro. Por solvi tiun problemon estas bezonata komuna penado de la registaro, lernejoj kaj familioj, necesas ankaŭ iuj protektaj, limigaj kaj kontrolaj preventaj rimedoj. Nun ankaŭ iuj aliaj sociaj departementoj, kia societo por prizorgi la junan generacion, atentis tiun problemon. ■

SHU MEI:

En la Ĉina Scienc- teknika Muzeo

ĈE la norda preterirejo n-ro 3 de Pekino estas giganta globa konstruaĵo. Jen la Ĉina Scienc-teknika Muzeo.

En la tago, kiam mi vizitis ĝin, mi renkontis multajn mezlernejanojn. Tie ili propraokule vidis multajn objektojn kaj fenomenojn, kiujn ili renkontis en lernolibroj. Tio ege ĝojigis la geknabojn. Jen la kvar gravaj inventoj de Ĉinio: Kompasso, pulvo, tekniko de papera farado kaj tipografio. Jen antikva kanono, silkaĵoj, primitiva fajencaĵo... La scivolemaj geknaboj demandis jen pri tio, jen



Paperfarado laŭ la antikva maniero

pri alio: Kial la porcelanaĵoj havas dekojn da koloroj? Kial la tegmentoj estas arkaj? Kial la teksaĵoj estas tiel maldikaj kiel cikada flugilo? Tie ili propraokule vidis, kiel oni faras paperon laŭ la antikva metodo, uzita de Cai Lun antaŭ pli ol 1 800 jaroj. Kiamaniere oni presas per tipografio, inventita de Bi Sheng antaŭ ĉ. 900 jaroj. Ankaŭ la vizitantoj povas mem provi la faradon.

“Ho, interese!” kriis knabo staranta sur granda platrado turniĝanta. En lia mano estas malgranda rado, kiu turniĝas simultane kun la platra-

do, tamen en inversa direkto. Kial? La knabo diris, ke tio estas laŭ la teorio de angula momenta konservado, kion li ĵus lernis en la lernejo. En la halo de modernaj sciencoj kaj teknikoj en la dua etaĝo estas pli ol 100 objektoj. Ilin provante, la geknaboj senpere komprenas la teorion kaj sciojn pri mekaniko, akustiko, optiko, elektro kaj magneto.

Por la vizitantoj kaj precipe por la geknaboj, ĉio en la muzeo estas mirinda kaj interesa: Ŝtala globo flosas sur akvo; konuso ruliĝas supren; homoj estas sekuraj en la kaĝo kun dekoj da miloj da voltoj da elektro; kiam oni tuŝas per sia mano Van De Graff-generatoron, liaj haroj hirtiĝas kiel pingloj. La antigravita spegulo flugigas vin en la spegulo... Post aro da demandoj, la geknaboj komprenis, ke tio ja estas sciencoj. S-ro Liu, estro de la muzeo, diris, ke la muzeo vere estas ideala loko por fari al la geknaboj scienc-popularigadon. En la ekspona halo kun areo de 6 700 kvadrataj metroj vidiĝas sciencaj atingoj de la antikva Ĉinio kaj tiuj de la moderna. La muzeo distingiĝas per tio, ke tie oni povas mem praktiki, tial oni povas lerni kaj apliki sciencojn dum praktikado. S-ro Liu demandis min, montrante iun pentraĵon: “Diru, ĉu tio estas figuro de juna aŭ maljuna virino?” Mi rigardis momenton kaj certiĝis, ke tio estas maljunulino. S-ro Liu ekridis. Li proponis, ke mi pririgardu de alia flanko. Tiam mi vidis en la loko de ŝiaj okuloj orelringojn, en la loko de ŝia nazo mentonon kaj en la loko de ŝia buŝo belan kolĉenon. Ho, la malbela maljunulino fariĝis bela knabino. La pentraĵo instruas al ni studi science de pluraj flankoj, sed neniel juĝi la aferojn unuflanke. Oni povas diri, ke en la eksponaj haloj ĉiuj objektoj havas edukan signifon.

De post sia malfermiĝo en 1988, la muzeo altiris al si ĉiutage pli ol mil vizitantojn. Antaŭ nelonge oni komencis eksponi tie komputilojn kun multimedia teknologio kaj inform-ekspreson, kiuj allogas pli multe da vizitantoj. La papago en la komputilo tre plaĉas al la vizitantoj. Kiam oni diris ion al ĝi, ĝi tuj imitas homan voĉon. Gvidate de la laborantoj, oni povas lerni pentradon per komputilo. La giganta globa konstruaĵo okulfrapanta ĉe la preterirejo antaŭe estis kolosa kinejo kun firmamenta ekranu. Per ekstreme granda larĝangula kaj fiŝokula lenso oni projekcias la filmojn sur la firmamentan ekranon kaj funkciigas modernan akustikan aparaton. Ĉio tre utilas al la rigardantoj en la ĝuado.

Kompare kun tiaspecaj muzeoj en iuj evoluintaj landoj, la ĉina eble ne estas la plej bona. S-ro Liu diris al mi, ke la muzea administrantaro planas konstrui ekspon-halojn kemian, energian kaj medi-protektan. Tiam ĝi estos progresinta muzeo kun ĉinaj karakterizaĵoj. ■


TRI REGNOJ



“Tri Regnoj” estas unu el la famaj ĉinaj klasikaj romanoj. Ĝi estis verkita de s-ro Luo Guanzhong, romanisto en la fina periodo de Yuan-dinastio (1206-1368) kaj komenco de Ming-dinastio (1368-1644). Ĝi estas la unua historia romano de Ĉinio. En tiu verko kun granda strukturo kaj komplikaj intrigoj viglas multaj historiaj personoj kun malsamaj karakteroj. Ĝi temas pri la ĉefa

historio de la tri regnoj Wei, Shu kaj Wu. Ĝi priskribas akrajn kontraŭdirojn kaj batalojn inter malsamaj regantaj klikoj. Ĝi faris grandajn influojn en la socia vivo de Ĉinio kaj ĝiaj bravaj herooj estas imitataj de multaj ĉinoj.

La poŝtmarko-serio konsistas el 4 pecoj. Ĝi estis emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio en 1994.



中國古典文學名著《三國演義》



Flora ekspozicio
en Nederlando
de J-CLAUDE
THUMERELLE
(Belgio)



Kaskado
de A. SOCHACKI
(Pollando)

ISSN 0032-4361



世界语 《中国报道》 一九九七年第十期
(本刊代号: 二—九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2